

revuo

esperanto

sept.-oktobro 1965

58-a jaro

n-ro 718-9 (9-10)

universala esperanto - asocio (en konsultaj rilatoj kun U.N.E.S.C.O.)



ESPERANTO

revuo internacia

enhavo

- 161 Inda jubilea Kongreso en Tokio (ĉefartikolo)
- 162 La Solena Inaŭguro
- 164 Komitato de UEA
- 165 Unua Labora Sekcio
Lastaj progresoj de la subskribo-kolektado
- 166 Laboraj Sekcioj kaj Generalaj Kunvenoj
- 167 La Kongresa teatraĵo: "Kataki — Malamiko"
- 168 Konkursoj: kunvenoj kaj rezultoj
- 169 Internacia Somera Universitato
Aliaj aranĝoj dumkongresaj
- 170 Japana vespero; eksteraj rilatoj
- 171 La Solena Fermo; Kongresa Rezolucio
- 172 La Juna Vivo: Plej bela kongreso de TEJO
- 174 Eŭropa Esperanto-Konferenco, Vieno
- 175 Internacia Festivalo de Oomoto
- 176 Mallongaj novaĵoj
Nekrologoj de Jong, Nanni, Malraison
Laŭlanda stato de la subskribo-kolektado
- 177 Esperanto en radio
- 178 Ricevitaj eldonaĵoj
La internaciaj konkursoj 1965
- 179 Oficiala informilo n-ro 383
- 180 Anoncetoj

kovrila bildo

S-ro H. W. Holmes, honora prezidanto de UEA, alparolas la 50-an Universalan Kongreson

bildojn liveris

- 167 Franciszek Myszkowski
- 175 Oomoto

**oficiala organo
de universala
esperanto-asocio**

(En Konsultaj Rilatoj kun U.N.E.S.C.O.)

esperanto
sept./okt. 1965

Fondita en 1904 de H. Hodler

Redaktoro: D-ro V. Sadler

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, manuskriptoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando. Telef. (010) 23 27 88 Girkonto 378964.

TELEGRAMOJ: ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Manuskriptoj por "Esperanto" estu tajpitaj en 2 ekzempleroj sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj tre larĝa margeno.

Bankisto de U.E.A.:

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-1.

Presisto: Drukkerij Zwagers c.v., Rotterdam-6.

Traduko kaj represo de artikoloj, kun escepto de verkoj premiitaj en konkursoj, estas permesitaj, kondiĉe ke oni menciu la fonton.

Jara abono (1965): 15,— gld. (kun membreco kaj jarlibro 20,— gld). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj: ricevebla laŭ peto.

Anoncetoj:

0,20 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en 81 landoj.

Estraro de U.E.A.:

Prof. d-ro I. Lapenna, prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

S-ro E. L. M. Wensing, vic-prezidanto, Postbus 412, Eindhoven, Nederlando.

S-ro E. Carlén, vic-prezidanto, Yxhult, Hållabrottet, Svedujo.

S-ro G. Becker, ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado kaj kongresoj, 6653 Blieskastel, Schlossbergstr. 51, Germanujo.

D-ro A. Albault, estrarano pri kulturaj aferoj, 32 Avenue Etienne Billières, Toulouse, Francujo.

S-ro M. Jaumotte, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, 44 De Bruynlaan, Wilrijk-Antwerpen, Belgujo.

S-ro J. Toczyski, estrarano pri lernejoj, skr. p. 57, Gdańsk, Pollando.

S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

Reprezentanto de TEJO ĉe la Estraro de UEA: S-ro H. R. Tonkin, 7 Linnaean Street, Cambridge, Mass. 02138, Usono.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: ARNold 90-81.

Serva Centro: ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7 8057 Zürich, Svislando.

Granda stimulo al la japana Esperanto-movado

Antaŭ ĝuste unu jaro ni skribis, ke "oni povas kun plena fido rigardi la unuan paŝon de la Kongresoj sur azian teron". Hodiaŭ tiu fido estas tiel supermezure pravigita, ke surbaze de la Tokia sperto oni povas kun granda optimismo antaŭvidi la estontajn paŝojn sur aliajn kontinentojn. La unua Universala Kongreso en Azio signu la komencon de nova, vere universala kongres-serio!

Kompreneble, la alta nivelo de la 50-a en Tokio — laŭ multaj partoprenintoj la plej kontentiga, kiun ili iam spertis — dependis parte de la materiaj kondiĉoj troveblaj en tiu moderna kaj dinamisma lando, kondiĉoj mankantaj en multaj aliaj mondopartoj. Sed ege pli grava faktoro estis la homa volforto. Aliandanoj alvojaĝis tiel amase, ke miris eĉ plej optimismaj organizintoj. Ili venis ŝipe, fluge, unuope, karavane, trans Siberio aŭ Pacifiko por esprimi sian solidarecon kun japanaj esperantistoj kaj sian fidon je la universaleco de la lingvo. El 1710 kongresanoj, 800 estis nejapanoj. Siaflanke la japanoj montris ne malpli da entuziasmo. Ilia sindediĉa diligento kaj akurateco certigis la glatan funkciadon de ĉiuj aranĝoj kaj prezentis modelon, kiun povus imiti eĉ la plej bonaj kongresoj en Eŭropo. Kaj ne estus troigo diri, ke ili traktis ĉiujn eksterlandanojn kiel siajn personajn gastojn.

Aparta valoro de Kongreso en Azio

Cu la rezultoj de la Kongreso, ekster la laŭprogramaj laboroj, vere kompensis la grandajn fortostreĉojn kaj neordinare altajn elspezojn? Al tio devus respondi unue tiuj, kiuj plej multe laboris kaj elspezis. Sed laŭ spontaneaj komentoj, tiel de okcidentanoj kiel de orientanoj, ŝajnas nedubebla, ke la Kongreso estis spirite riĉiga kaj profunde impresa sperto.

En Japanujo ekzistas minimume 60-jara Esperanto-movado. Tamen ĝis antaŭnelonge, pro la aparta situacio de tiu lando, ne ekzistis forta tradicio de *parola* uzo de la Internacia Lingvo. La "kunvivadoj" — plurtagaj kunloĝaj kursoj por gejunuloj, kiuj por tiuj okazoj sin devigis paroli nur en Esperanto — komencis, jam du tri jarojn antaŭ la UK, establi tian tradicion. Ke ankaŭ japanoj kapablas per unu aŭ du jaroj da studo atingi parolan kompetentecon en Esperanto, tion kredigis la "kunvivadoj" kaj definitive pruvis la Universala Kongreso. Ĝi montris, ke nur parola uzo donas veran vivon al la lingvo. Tiel, laŭ la opinio de eminenta japana esperantisto, nur nun la Esperanto-movado en Japanujo efektive komenciĝis.

Por okcidentanoj la Kongreso estis ne malpli instrua. Multaj konfesis, ke ili alportis al Tokio aron da miskonceptoj kaj antaŭjuĝoj, kiujn la realeco rapide forbalais. Anstataŭe ili forvo-

jaĝis kun novaj scioj pri la orientazia kulturo kaj kun granda respekto por multaj elementoj de la japana vivmaniero. Fine multaj ekkomprenis, ke por harmonio inter Oriento kaj Okcidento necesas ne nur komuna lingvo, sed ankaŭ reciproka peno por akordiĝi kun la pensmaniero unu de la alia.

En siaj laboroj la Kongreso spegulis ankaŭ tiun neceson — precipe en la Unua Sekcio "Aspektoj de Internacia Kunlaborado". Menciinda estas ankaŭ la decido de la Estraro subvencii malgaŝan lernolibron, kaj la instigo de la Komitato al "adopta" kunlaboro inter fortaj landaj asocioj unuflanke kaj malfortaj aziaj aŭ afrikaj organizaĵoj aliflanke.

Kunsidoj de la Estraro de UEA

La Estraro de UEA kunsidis trifoje dum la UK kaj unu plian fojon — kun ĉeesto de la Prezidanto kaj s-roj Wensing kaj Jaumotte — en la Centra Oficejo la 20-an de aŭgusto. La ĉefaj diskutoj koncernis la laborplanon de la Jaro de Internacia Kunlaboro, la planojn por solena transdono de la Propono al UN komence de 1966, kaj la kongresajn aranĝojn por la venonta jaro. Pri la kolektado de subskriboj ĝi decidis instigi ĉiujn landojn al konkurenco por subskribigi difinitan procenton de la landa loĝantaro. Tiel evidentiĝos, kiuj landoj plej efike agas rilate al la faktaj eblecoj. En ĉiu okazo la kolektado daŭru nebremsite ĝis la fino de 1965.

Pri la UK en Budapeŝto okazis kontaktoj kun Hungara E-Asocio en Tokio kaj aliaj inter la Prezidanto de UEA kaj membroj de LKK en Vieno. La ĉefaj decidoj estas jenaj: en la programo de la 51-a UK okazos la Tria Internacia Arta Festivalo; pro tio ne povos okazi laborsekcioj, sed la Unua Ĝenerala Kunveno estos dediĉita al la temo "Esperanto en la fakoj". En Graz (Aŭstrujo) okazos antaŭ la UK la Dua Internacia Konferenco de Lernejoj (en kiuj Esperanto estas instruata), kun programo esence identa kun tiu planita por Bishop's Stortford. Paralele kun la UK okazos la 10-a Internacia Infana Kongreseto.

Pri eldonaĵoj — la Estraro decidis plue eldonadi "Monda Kulturo", kies financa bazo nun plifortiĝis, kaj emfazis la diferencajn celojn de "Esperanto" (por aktivuloj kaj lingve progresintoj) kaj "Praktiko" (por facila legado distra kaj instrua).

★

Nun, kiam revo estas plenumita, kiam la unua Universala Kongreso en Azio estas pasintaĵo, necesas adicii. Utilaj laboroj, konkretaj resolucioj, pliproksimigo de orientanoj al la agado de UEA, malfermo de novaj larĝaj perspektivoj por la monda movado: ĉu ne sumiĝas ĉio ĉi je inda jubileo?



Bonvenigas LKK-prezidanto Nishi. Dekstre sidas la festparolonto.

Ĉeestis la Alta Protektanto

La momento estis historia. Kaj la sceno plene adekvata al tiu momento. En la rafinite moderna salonego de Ueno Bunka Kaikan. Tokio, en ĉeesto de la Alta Protektanto de la Kongreso kaj de ambasadoroj kaj aliaj reprezentantoj de registaroj, la honora prezidanto de UEA, s-ro H. W. Holmes, malfermis la 50-an jubilean Universalan Kongreson de Esperanto. Ke por la plimulto de la kongresanoj tiu 50-a estis samtempe la unua, ĉar la unua okazinta en ilia kontinento — tio donis al la momento ankoraŭ pli intensan signifon. Tiun signifon sciis bone envortigi la prezidanto de LKK, prof. Seiho Nishi, en sia bonveniga saluto: "unu el la plej memorindaj tagoj en la historio de Esperanto".

Dankante la salutojn, s-ro Holmes gratulis al LKK, kiu tiel kuraĝe entreprenis la gigantan taskon organizi la unuan Universalan Kongreson en Azio. Tia decido estis tamen plej aktuala, ĉar Azio ludas ĉiam pli gravan rolon en mondaj aferoj. Li direktis la pensojn de la ĉeestantoj unue al la Prezidanto de UEA, prof. Lapenna, kiu tre bedaŭris, ke ne estis eble por li persone vojaĝi al Tokio, kaj due al la forpasinta prezidanto, prof. Yagi, kiu jam en 1937 pledis por okazigo de kongreso en Japanujo. Per unuminuta silenta staro la Kongreso omaĝis al la memoro de Hideo Yagi.

Sekvis salutoj japanlingvaj de eminentaj gastoj kaj reprezentantoj, kun traduko en Esperanton. Unue la Alta Protektanto, d-ro Yuji Shibata, Prezidanto de la Japana Akademio, esprimis sian deziron, ke la U.K. signifu veran vigligon de la Esperanto-movado en Japanujo. Respondis s-ro Carlén. Due la japana eduk-ministro aparte akcentis, en mesaĝo, kiun voĉlegis lia reprezentanto, la taŭgecon de la kongresa temo "Oriento-Okcidento". Dankis s-ro Holmes. Ankaŭ la ministro de eksterlandaj aferoj sendis skribitan saluton, menciante la feliĉan koincidon de la Kongreso en Tokio kun la Jaro de Internacia Kunlaboro. Tre interesan salut-paroladon kontribuis s-ro Kojiro Inoue, ĝenerala sekretario de la japana nacia komisio-

"MEMORINDA

no por Unesko. Li mem spertis gravajn malfacilaĵojn en internaciaj konferencoj, kaj atentigis pri la maljusteco de la nuna sistemo de "oficialaj lingvoj". La parolinton dankis s-ro Becker.

La prezidanto transdonis nun la parolvicon al la ambasadaĵ reprezentantoj de Aŭstrujo (sukcesa Eŭropa Esperanto-Konferenco antaŭ kelkaj tagoj), Bulgarujo (mesaĝo de s-ro Georgi Trajkov, siatempe Alta Protektanto de la 48-a U.K.), Hispanujo kaj Hungarujo (invito vidi per la 51-a U.K. en Budapeŝto, kiel alte la hungara registaro taksas la laboron por Esperanto). Aplaudon vekis la informo de s-ro Holmes, ke ĉeestas ankaŭ ambasadaĵ reprezentantoj de Finnlando, Italujo, Jugoslavio, Pollando, Svedujo kaj Urugvajo. Mesaĝon de la nederlanda ambasadoro voĉlegis s-ro Woessink.

Mesaĝo de la Prezidanto de UEA

Post registaraj salutoj de Belgujo, Norvegujo, Svedujo kaj Urugvajo, s-ro Holmes anoncis la aŭdigon de speciala sonbenda mesaĝo de la Prezidanto de UEA. Streĉan silenton rompis la konata voĉo de d-ro Lapenna, efike transportante, malgraŭ teknikaj malfacilaĵoj, la oceanojn kaj kontinentojn. Komencinte per omaĝaj vortoj pri prof. Yagi, li sendis korajn salutojn "al la Kongreso, al ĉiuj kongresanoj, sed speciale al la Esperantistaro de la gastiganta lando kaj de tuta Azio, ĉar por la unua fojo en la historio de la Internacia Lingvo ni kunvenas en tiu ĉi mondoparto.

"Tamen, ne nur en tio konsistas la graveco de la Kongreso. Aldoniĝas la fakto ke ĝi estas jubilea kaj ke ĝi okazas ĝuste en 1965, nome en la Jaro de Internacia Kunlaboro, kiu samtempe estas la Jaro de la Internacia Lingvo. Tio necese donas al la Kongreso stampon de eksterordinara signifo precipe por la landoj de Azio, de aparta soleneco kaj de pluraj respondecaj taskoj. El ili, tri ŝajnas al mi la plej elstaraj kaj la plej urĝaj.

"La unua estas pritrakti la plenumadon de la Laborplano de U.E.A. por la Jaro de Internacia Kunlaboro kaj instigi al maksimuma realigo de ĉiuj eroj...

"La dua, paralela, tasko estas multe kreskigi la nombron de individuaj membroj de U.E.A., aligi la ankoraŭ nealiĝintajn organizaĵojn kaj ĝenerale fortikigi nian mondan Asocion...

"La tria tasko, firme ligita al la aliaj, estas unueca agado laŭ la planoj kaj decidoj akceptitaj de niaj superaj organoj..." (Aplaudoj)

S-ro Holmes nun transdonas la saluton de honora prezidanto Ernfrid Malmgren, kiu mem prezidis multajn Universalajn Kongresojn, kaj tuj la Direktorino de la Centra Oficejo enkondukas tiun parton de la inaŭguro, kiun ĉiam multaj trovas plej emocia: la salutoj de la landaj asocioj. El la aliĝintaj al UEA salutis

la aŭstralia, aŭstra, belga, brita, dana (la Proponon al U.N. subskribis duono de la dana registaro kaj parlamento), finna, franca, germana, hispana, hungara, itala, japana (la prezidanto de LKK, prof. Nishi), jugoslavia, kanada, monaka, nederlanda, norvega, nov-zelanda (personaj salutoj de la ĉefministro k.a.), pola, sveda, svisa, urugvaja kaj usona (kies membraro kreskis per 25 % en la pasinta jaro).

Por nealiĝintaj asocioj salutis s-ino M. Haudebine (Hinda Instituto de Esperanto, kiun ŝi mem fondis dum sia plurjara tiea laborado), prof. Hengwi Hong (Korea E-Instituto) kaj s-ro S.N. Podkaminer (Komisiono pri Internaciaj Ligoj de Sovetaj E-istoj). Fine s-ro Nassif Isaac salutis nome de esperantistoj de U.A.R.


Festparolis Carlo Minnaja

La kronon de la inaŭgura solenaĵo aldonis — kiel tion esprimis la prezidanto — ĉifoje ne Privat, ĉifoje ne Lapenna, sed nova festparolanto: Carlo Minnaja. La juna oratoro komencis de la deklaro, ke "festparolado hodiaŭ devus esprimi la konfuzajn kaj nedireblajn sentojn, kiuj ĝoje agitiĝas en ĉiuj koroj okaze de la unua Universala Kongreso en Azio."

Turnante sin al la lastatempaj atingoj de la movado, li konstatis, ke "sendube miloj da personoj devus honeste agnoski, ke ili sen la informoj rekte aŭ ne rekte ricevitaĵoj tra la Esperanto-movado, estus nenion eksciintaj pri la signifo kaj la celo de la Jaro de Internacia Kunlaboro." Ankaŭ la atingoj en la sveda parlamento kaj en la lernejoj de diversaj landoj, la unuaj sukcesoj de la subskribo-kampanjo kaj la fakto, ke ĉ. 300 personoj kandidatis UEA-on ĉijare por la Nobel-premio por Paco — ĉio ĉi indikas la nove favoran klimaton.

Fine: "Ni revenu al niaj landoj kun novaj ideoj kaj refreŝigita entuziasmo, post kiam ni dum unu semajno kune restis en la agordo internacia. Kaj tiun alvokon mi direktas precipe al tiu esperantisto, kaj ĉi-jare estas aparte multaj en tia situacio, kiu unuafoje hodiaŭ partoprenas universalan kongreson. ... Eĉ se li poste ankoraŭ multajn kongresojn vizitos, li ĉiam memoros, ke lia unua partopreno en la ĉiujara granda festo de la esperantismo okazis en la signo de la internacia kunlaboro, en la signo de la du manoj frate interpretiĝantaj. Kaj je tiu memoro lin junece trakuros la sama ĝoja spirito, per kiu malfermiĝis la 50-a Jubilea Universala Kongreso de Esperanto."

Galeria rigardo al parto de la salono en Ueno Bunka Kaikan, tuj post la Solena Inaŭguro



La Komitato de UEA kunsidis en Tokio dufoje, la 3-an kaj 6-an de aŭgusto.

Pro la fakto, ke relative malmultaj komitatanoj povis ĉeesti aŭ reprezenti en Tokio (mankis la kvorumo de 33 personoj), ĉiujn raportitajn decidojn devas skribe konfirmi la tuta Komitato. La kunvenojn tamen ĉeestis ĉirkaŭ 30 komitatanoj, krom membroj de la publiko.

En sia kunsido de 3 aŭgusto la Komitato omaĝis al la forpasinta komitatano Charles Thollet, pro kies forpaso restis la ebleco alekti unu novan komitatanon C. Laŭ propono de pluraj komitatanoj la vakantan lokon okupis d-ro Carlo Minnaja, elektita per 23 voĉoj kun unu sindeteno.

La raporto de la Estraro

La diskuto pri la Estrara Raporto por 1964/5, kiun fine la Komitato akceptis unuanime, evidencigis plurajn interesajn punktojn. Al sugesto de s-ro Kostianen, ke estus preferinde kombini iujn el la revuoj de UEA, s-ro Woessink respondis, ke ĉiu el ili havas sian apartan karakteron kaj celojn, kaj ke tial ili prefere restu memstaraj. El diskuto pri "adopta" agado por malfortaj landaj organizaĵoj en Afriko kaj Azio montriĝis, ke jam Norvega E-ista Ligo "adoptis" Madagaskaron kaj Mozambikon, dum Madagaskaron helpas ankaŭ Germana Esperanto-Asocio. La laboron de s-ino Haudebine en Hindujo apogis krom

UEA ankaŭ la franca landa asocio, UFE.

La raporton de la Centro de Esploro kaj Dokumentado la Komitato same aprobis kun aparta danko kaj gratulo al ĝia direktoro. Pluraj komitatanoj emfazis la neceson pli multe utiligi la dokumentojn de CED, precipe per traduko en aliajn lingvojn. La grava dokumento CED/7 jam aperis en la lingvoj angla kaj hispana, kaj Germana Esperanto-Asocio nun pretigas tri dokumentojn en la germana.

Mil membroj bezonataj

Laŭ rekomendo de speciala dumkongresa financa komisiono, la Komitato unuanime akceptis la buĝeton por 1966, kvankam ĝi estrarano pri financoj atentigis, ke ĉi-foje necesis buĝeti deficiton, kion povus nuligi nur la aliĝo de 1000 pliaj individuaj membroj.

Okazis vasta interŝanĝo de spertoj kaj rekomendoj pri la Jaro de Internacia Kunlaboro, kaj precipe pri la kolektado de subskriboj por la Propono al U.N. S-ro Becker atentigis, ke en kelkaj regionoj la proporcioj estas tute neĝustaj: ekzemple en Sarlando oni kolektis relative multe pli ol en aliaj regionoj de Germanujo. En la kolektado esencan rolon devas ludi la landaj asocioj, precipe per daŭra instigado al la lokaj grupoj.

Inter ceteraj decidoj de la Komitato elstaras la jenaj: Aprobo de la Kongresa Rezolucio proponita de la Estraro (vidu p. 171), unuanime.

La Estraro klarigas antaŭ la Komitato sian agadon dum la pasinta laborjaro. De dekstre: la estrarano pri financoj; vicprezidanto Carlén; la ĝenerala sekretario; honora prezidanto Holmes; la direktorino de la Centra Oficejo.





Unuanima akcepto de kelkaj ŝanĝoj en la statuto de TEJO, jam aprobitaj de ĝia Komitato: la ĉefaj ŝanĝoj rilatas al pli striktaj financaj ligoj kun UEA kaj al la ebleco aligi fakajn junularajn asociojn al TEJO. Rekomendo de la propono de la Societo de Internaciaj Plumamikoj, distribuita dum la Kongreso, pri reeldono de la konataj "ŝlosiloj de Esperanto" kaj eldono de novaj tiaj ŝlosiloj.

La Komitato unuanime decidis sendi gratulan telegramon al U Thant pro la 20-jara datreveno de Unuiĝintaj Nacioj.

Pri neŭtraleco

Fine, la Estraro atentigis pri bedaŭrinda raporto aperinta en anglalingva ĵurnalo "Japan Times", eldonata en Tokio. Ĝi samtempe montris Esperanto-standardon, sur kiu estis skribitaj politikaj sloganoj. Post ampleksa diskuto la Komitato akceptis jenajn rezoluciojn, el kiuj la unua (sen la lasta frazo) aperis en "Japan Times" la 7-an de aŭgusto sub la titolo "Esperanto is Neutral" (Esperanto estas neŭtrala). Ankaŭ la prezidanto de la kunveno de Mondpaca Esperantista Movado sendis korekton al la sama ĵurnalo.

REZOLUCIOJ

La Komitato de UEA, vidinte la raporton "Esperanto Body Hits 'American Aggression'" (Japan Times, 5 aŭgusto 1965), en kiu oni ŝajnigas, ke la Universal Kongreso de Esperanto konsideros rezolucion, kiu kondamnas la agadon de Usono en Vjetnamio, emfazas, ke la Universalaj Kongresoj de Esperanto estas strikte neŭtralaj, kaj deklaras, ke la nomita raporto koncernas nur grupon, kies kunvenoj ne estas parto de la oficiala kongresa programo. Tiu grupo, la t.n. Mondpaca Esperantista Movado, mem asertis al la prezidanto de la Universal Kongreso de Esperanto, ke la artikolo ne reprezentas la faktojn. La Komitato ankoraŭfoje substrekas, ke la Universalaj Kongresoj estas absolute neŭtralaj kaj deziras, ke la Estraro tuj agu por korekti la misinformojn en la raporto.

(Akceptita per ĉiuj voĉoj kun unu sindeteno)

☆

La Komitato, eksciinte pri la fakto, ke sur Esperanta standardo estis skribitaj politikaj ofendaj vortoj, fortege kaj plej absolute kondamnas la misuzadon de la Esperanta flago por tiuj politikaj celoj. Ĝi substrekas, ke tiu flago ne reprezentas nur la Internacian Lingvon, sed ja ankaŭ la Esperantistan movadon, kiu estas neŭtrala.

(Akceptita per ĉiuj voĉoj, kun unu kontraŭ kaj unu sindeteno)

Modela agado por la Propono al UN en Japanujo, rekordaj atingoj de kelkaj individuoj, plilongigo de la kampanjo ĝis la fino de 1965 — jen la ĉefaj punktoj aperintaj el la unua parto de la laborsekcio "Aspektoj de internacia kunlaborado". Raporton de prof. Lapenna pri la Jaro de Internacia Kunlaboro voĉlegis la ĝenerala sekretario. Ĉirkaŭ 60 kongresanoj ĉeestis sub prezido de s-ro E. Carlén.

La raporto unue resumis la historion de la agado de UEA por la JIK, la specialan laborplanon (vidu "Esperanto" januaro p.2) kaj la ĝisnunajn rezultojn per ĝi akiritajn. La 26-an de junio okazis en diversaj landoj prelegoj en Esperanto pri la datreveno de la subskribo de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj. Necesus refoje aranĝi taŭgajn prelegojn kaj festajn kunvenojn okaze de la Tago de UN, la 24-an de oktobro.


Lastaj progresoj de la subskribo-kolektado

Ĝis antaŭ la Kongreso la nombro de subskriboj ricevitaj en Rotterdam estis ĉ. 200 000 individuaj kaj 1000 kolektivaj kun 27 milionoj da membroj. Sed en Tokio la reprezentanto de Oomoto povis anonci, ke la Oomoto-movado sola kolektis en Japanujo 148 912 individuajn subskribojn. Se oni aldonas la subskribojn alvenintajn en Rotterdam ĝis la 25-a de aŭgusto, la monda sumo devas esti minimume jam 400 000 individuaj kaj pli ol 1100 organizaĵoj kun pli ol 43 milionoj da membroj.

Aparte menciindaj estas subskriboj de prof. Walter Hallstein, prezidanto de la Eŭropa Ekonomia Komunumo (Komuna Merkato), s-ro E. Anseele, belga ministro pri PTT, Sir Walter Nash, antaŭa ĉefministro de Nov-Zelando, s-roj H. G. R. Mason kaj J. Mathison, antaŭaj ministroj en Nov-Zelando, kaj la urbestro de Bristol, Anglujo. La nombro de kolektivaj subskriboj altiĝis ĉefe pro tiuj de la Internacia Unuiĝo de Nutraj- kaj Hotel-Industriaj Laboristoj (centro en Sofio), kun 12 000 000 membroj, de la bulgara Patrolanda Fronto (3 800 000 membroj), de la Mondfederacio por Bestprotektado (1 1/2 m.) kaj la Dana Sport-Unuiĝo (1 m.).

El la diskuto konatiĝis la nomoj de pluraj rekorduloj de la kolektado: unuavice s-ino Vera Kirilova (Bulgarujo), kiu persone varbis pli ol 6000 individuajn. Sed la ĝisnunan rekordon ŝajne tenas s-ro László Molnár (Hungarujo), per 7273 individuaj. En Gronlando subskribis 600 personoj el suma loĝantaro de nur 37 000.

Pluraj ĉeestantoj konfirmis raportojn, kiuj atingis la Centran Oficejon, pri la granda infirma efiko de la kampanjo, kio siavice per vasta publikigo de la afero plifaciligas la kolektadon. La plilongigo de la kampanjo ĝis la fino de 1965 permesos plene ekspluati tiun kreskantan efikon.



Subskribis J. O. Krag, dana ĉefministro

KULTURAJ INTERŜANĜOJ; KOMERCO KAJ INDUSTRIO

En la dua parto de la laborsekcio "Aspektoj de internacia kunlaborado" d-ro V. Sadler raportis pri la dekjara ĉefprojekto de Unesko "Oriento-Okcidento". Kvankam la projekto mem finiĝos en 1966, ĝi estis tiel sukcesa, ke esence simila agado plu daŭros sub la pli vasta titolo "Reciproka studo kaj aprezo de kulturoj". La raportanto konsideris ankaŭ la kontribuon de la Internacia Lingvo al tiu projekto dum la pasinta jardeko, kaj detaligis sugestojn por la estonteco.

En vigla diskuto partoprenis unuavice s-ro N. Smith el Gano, siatempa sekretario de la komisiono "Oriento-Okcidento" de UEA. S-ro Mark Starr (Usono) opiniis tre celinda ian koncizigitan eldonon en Esperanto de la "Historio de la homaro" nun eldonata de Unesko en naciaj lingvoj.

Ĉar baldaŭa artikolo en "Esperanto" traktos detale tiun ĉi temon, sufiĉu ĉi tie citi la unuanime akceptitan rezolucion de la sekcio:

REZOLUCIO

La Unua Labora Sekcio de la 50-a UK, kun temo "Aspektoj de internacia kunlaborado", *Konsiderinte* la raporton pri la ĉefprojekto de Unesko "Oriento-Okcidento",

Plene aprobas la klopodojn de Unesko per la ĉefprojekto pri reciproka aprezo de kulturaj valoroj;

Notas kun kontento la ĝisnunajn specialajn klopodojn de UEA kaj de aliaj Esperanto-organizaĵoj kaj eldonejoj dum la lastaj dek jaroj por eldoni gravajn tradukojn, precipe en la serio "Oriento-Okcidento" de UEA, kaj krei per eldonaĵoj kaj seminarioj novan interesiĝon pri la relative nekonataj kulturoj de la mondo; *Rekomendas* al ĉiuj Esperanto-organizaĵoj kaj -eldonejoj (1) daŭrigi la klopodojn en la venontaj jaroj, precipe per eldono de orienta

klasika literaturo kaj de literaturo de Afriko kaj Mez-Oriento, kaj informadi pri siaj projektoj al UEA, (2) laŭeble kompili kaj eldoni novajn bibliografiojn de difinitaj naciaj literaturoj en Esperanto kaj terminarojn pri nacikulturaj konceptoj laŭ la modelo de Enciklopedieto Japano, (3) eventuale starigi landajn komisionojn aŭ komisiitojn pri Oriento-Okcidento por stimuli kaj kunordigi la agadon laŭ la modelo de la regionaj centroj starigitaj de Unesko;

Rekomendas al ĉiuj lokaj Esperanto-grupoj ĝemele ligiĝi kun alikontinentaj grupoj kaj interŝanĝi kulturajn materialojn, ekzemple sonbendojn de nacia muziko kun klarigoj; *Plue instigas* la Estraron de UEA kiel eble plej serioze pritrakti la organizon de prelegvojaĝoj de eminentaj orientanoj en okcidentaj landoj.

La temo de la Dua Labora Sekcio estis "La lingva problemo en la internaciaj ekonomiaj rilatoj". Raporton de s-ro E. L. M. Wensing voĉlegis s-ro Carlén, dum prezidis s-ro E. J. Woessink. La raporto precipe emfazis la kreskon de la lingva problemo en tiu aspekto, ekzemple pro la transmigrado de laboristoj inter la landoj de la Eŭropa Ekonomia Komunumo, la Asocio Latin-Ameriko por Libera Komercio, KOMEKON k.a. Ne mankas okazoj por por-Esperanta agado, sed la antaŭnelonge fondita EKI (Instituto por Esperanto en Komercio kaj Industrio) urĝe bezonas fidindajn kunlaborantojn kaj pli da financa apogo.

Eble la plej interesa sugesto, kiu aperis el la posta diskuto, estis tiu de s-ro D. MacGill (Nov-Zelando), kiu opinias, ke estus finance avantaĝe traduki patentojn per la ponto de Esperanto, ĉar tre ofte unu sama patento estas dezirata en ĉiuj landoj kaj ĉiuj lingvoj.

TEJO: RAPIDA KRESKO PROBLEMIGIS FINANCOJN

Laŭ plurjara tradicio, la Unua Ĝenerala Kunveno estis dediĉita al la salutoj de fakaj organizaĵoj kaj al la laboro de TEJO, la junulara sekcio de UEA. Prezidis respektive s-ro E. Carlén, vic-prezidanto de UEA, kaj la ĝenerala sekretario de TEJO, Carlo Minnaja. En la nuna jaro la nombro de fakaj salutantoj estis malgranda, nur kvin: KELI, Oomoto, ESLI (ŝakludantoj), SEL (skoltoj) kaj kooperativistoj. Aliflanke la laboro de TEJO tiel kreskis en la pasintaj du tri jaroj, ke ĝi plenrajte okupis la atenton de la ĉ. 200 ĉeestantoj kaj necesigis du apartajn multobligitajn raportojn distribuitajn inter la aŭskultantoj.

En la raportoj kaj en la parolaj klarigoj de la prezidanto elstaris la ofteco de la kontaktoj inter TEJO-estraranoj ("interŝanĝis ĉ. 800 gramojn da leteroj" dum la jaro!), la daŭra klopodo starigi novajn landajn sekciojn tie, kie ĝis nun ili mankis, la granda laboro dediĉata

al "Kontakto", kaj la tre intensa agado rilate ne-esperantistajn junularajn organizaĵojn.

Aliflanke evidentiĝis, ke la enspezoj de TEJO neniel povis atingi la rapidan kreskon de la agado. Tial necesis ripetfoje alvoki la publikon al komprenema financa helpo. Jam en la sama kunveno TEJO ricevis tujan reagon en la formo de 150-dolara donaco de ELNA, pere de ĝia prezidanto s-ro Helmuth.

La Dua Ĝenerala Kunveno komenciĝis per memorigaj vortoj de s-ro Carlén pri la viktimoj de la Dua Monda Milito, okaze de la datreveno de Hiroŝima. La ĉeftemo de la kunveno estis la Estrara Raporto, pri kiu la estraranoj respondis diversajn demandojn de la membroj de UEA. S-ino M. Haudebine aldonis freŝajn informojn pri sia laboro en Hindujo.


La programon fermis raportoj pri la dumkongresaj laboroj de diversaj fakaj organizaĵoj.



Czesław Przybyła

TRAGEDIA MALKOMPRENO

"Kataki — Malamiko"



Lucjan Wiernek

Du vesperojn de la kongresa semajno la ŝtata Teatro Populara de Łódź ludis "KATAKI"* antaŭ milo da spektantoj, bone kompenzante la mankon de IAT.

Temas pri batalo inter japana soldato Kimura kaj juna usona aviadisto Alvin, kiujn la sorto devigis vivi kune sur senhoma insuleto de Pacifika Oceano en la lasta mondmilito. Unue estis malamo, ĉar ili devis esti "kataki" unu de la alia, ĉar ili ne havis komunan lingvon por kompreni sin reciproke. Ili tamen iel daŭrigas komunan vivon dum monatoj. Intertempe naskiĝas kutimiĝo, eĉ amo inter la "malamikoj", kaj kiam ili ekscias ke ili estas amikoj, tiam alvenas usona barko por savi Alvin kaj meti tragedian finon al la dramo.

Aparte signifa por japanoj, usonanoj


"KATAKI" en Esperanta traduko estis jam plurfoje prezentita en aliaj landoj fare de la sama trupo. Sed ĝia prezentado en Japanujo havas apartan signifon, ĉar inter japanoj estas multaj, kiuj mem suferis similajn spertojn antaŭ dudeko da jaroj. Cetere la japanaj spektantoj povis kompreni ankaŭ la parolon de Kimura (Czesław Przybyła), dum la aliaj nur tiun de Alvin (Lucjan Wiernek) en Esperanto. Kaj kvankam la japana lingvo de Kimura, iom stranga al iliaj oreloj, kaŭzis en netrafaj momentoj ridon ne bonvenan, tamen lia humaneca, kortuŝe sincera figuro ne povis ne impresi al la spektantoj ke li havas la amon de homo antaŭ ol la devon de militisto.

La perfekta aktorado de la du roluloj (reĝisorita de Roman Sykała) kaj la bela lingvo forte altiris la okulojn kaj orelojn al la sceno kaj naskis varman internacian etoson inter la aktoroj kaj la spektantoj.

La teatraĵo donis kortuŝan emocion al la spektantoj, viglan spronon al la kreskanta teatra movado de japanaj esperantistoj, kaj plian pruvon ke ni havas vere vivantan komunan lingvon, kiu sola povos savi nin el tragedia malkompreno.

H. Sakaeda

* KATAKI, dramo de Shimon Wincelberg. Tradukis Tadeusz Markowski kaj Jerzy Uśpieński. Originala titolo: "The Sea is Boiling Hot".



JAPANOJ DISTINGIĜIS EN KONKURSOJ

Belartaj konkursoj: Ĉirkaŭ 250 kongresanoj ĉeestis la 4-an de aŭgusto kunsidon en kiu d-ro V. Sadler, anstataŭante la prezidanton de la juĝkomisiono, publike prezentis la rezultojn de la ĉi-jaraj konkursoj. Li anoncis, ke 40 aŭtoroj en 16 landoj konkursis, per entute cento da verkaĵoj. Plej multe kontribuis hungaroj kaj japanoj. En la poeziaj branĉoj juĝis s-roj W. Auld kaj M. Lukaŝ kaj s-ino C. Conterno, dum la prozajn traktis s-roj A. Venture, J. H. Rosbach kaj R. Bernard.

La sukcesoj de japanaj konkursintoj evidente plaĉis al la publiko, kiu varme salutis ilin per aplaŭdo. S-ro Masayuki Kuroda mem deklamis siajn originalaĵojn, kaj aliajn premiitajn verkojn deklamis s-roj Huĝimoto kaj Sadler. Laŭkutime, verkoj premiitaj aperos sur la paĝoj de "Monda Kulturo" kaj "Esperanto".

Arĝenta Sprono de KOKO: En la sama kunveno la parolvicon ricevis s-ro Ib Schleicher, reprezentante la eldonejon KOKO, kiu ĉiujare aljuĝas diplomon kaj arĝentan insignon al la plej sproninda originala aŭtoro de la jaro. Ĉi-jare ĝi elektis jam plene maturan aŭtoron, kies talento tamen nur lastatempe manifestiĝis en libroformo. Temas pri la konata redaktoro de "Oomoto", akademiano T. Nakamura, kaj pri lia originale kompilita "Enciklopedieto Japano". "Sur tiaj verkoj baziĝas la evoluo de nia lingvo". Tiel klarigis inĝ. Schleicher la elekton. Certe multaj kongresanoj, kies ekkompreno pri

la kulturo de Japanujo fontis el legado de tiu verko, povis senrezerve konsenti.

Oratora konkurso: Unu el la plej allogaj eroj de la oficiala kongresa programo estas ĉiam la oratora konkurso. Ankaŭ la nunjara ne estis escepto, kvankam mankis internacieco inter la junaj oratoroj: 4 japanaj kaj unu pola. Pri tio sendube kulpis la financa malfacileco por junuloj de vojaĝo al Japanujo. Juĝis s-roj J. Umeda, C. Minnaja kaj J. Uspienski, sub prezido de la unua.

S-ro Kordylewski, kiu en 1964 ricevis kuraĝigan premion, ĉi-jare atingis la unuan lokon per parolado pri la temo "Ĉu la modernaj distraĵoj kompensas la difektadon de la naturo?". Lia nomo do estos gravurita sur la pokalo Ivo Lapenna. La aliaj premiitoj parolis respektive pri "Internacia kunlaboro" kaj "Ĝentileco".

Foto-konkurso. Loka juĝkomisiono en Tokio havis la malfacilan taskon elekti la plej premiindajn el 160 fotografaĵoj de 70 konkursintoj en dek landoj. La ĉefpremion gajnis Tadeusz Kowalski (Pollando), jam konata pro sia duobla premiigo en la konkurso de 1961 en Harrogate. Arte aranĝita stando en la kongresejo elmontris la premiitajn fotojn dum la tuta semajno. Detalaj rezultoj kaj eventuale reproduktajo de unu el la fotoj aperos en posta eldono de "Esperanto", dum la aliajn publikigos "Monda Kulturo".

BELARTAJ KONKURSOJ

Originala poezio

1. Miyamoto masao (Japanujo): "Longutao pri enotero";
2. Masayuki Kuroda (Jap.): "En frua printempo";
3. Violin Oljanov (Bulg.): "Printempo en la montaro"

Laŭdaj mencioj:

4. V. Oljanov (Bulg.): "Nokto en la montaro";
5. Jiří Kořínek (Ĉeĥoslovakio): "Al la virino";
6. Vesna Skaljer-Race (Jug.): "Iu ekkredas";
7. Masayuki Kuroda (Jap.): "Melankolio salajrula".

Tradukita poezio

1. Jiří Kořínek (Ĉeĥoslovakio): "Pensas ja kelkiu" de O. Skoroĥodová (1914-);
2. Julio Varga (Hungarujo): El "Rubaiyat" de Omar Khayyam (1040?-1123) laŭ Edward Fitzgerald (1809-1883);
3. Ueyama masao (Japanujo): "Poemoj de floroj" de Horiguti daigaku;

Laŭdaj mencioj:

4. Julio Varga (Hungarujo): "Sep ŝarĝoj" de J. R. Becher (1891-1958);
5. Stefan Marinov-Kiraĝiev (Bulgarujo): "Duelo" de Nikola Vapcarov (1909-1942).

Originala prozo

1. Tibor Sekelj (Jugoslavio): "Neĝhomo";
 2. Vesna Skaljer-Race (Jugoslavio): "Lumoj";
 3. Andreo Szabó (Hungarujo): "Lasta paŝo";
- Laŭdaj mencioj:
4. Konisi gaku (Japanujo): "La kosmoŝipo Edeno 5";
 5. Michel Duc-Goninaz (Francujo): "La ŝakmatĉo".

Originala dramo

- 1 kaj 2. Nealjuĝitaj;
3. Vesna Skaljer-Race (Jugoslavio): "Rendevuo".

Premio "nova talento": nealjuĝita.

ORATORA KONKURSO

Premiitoj:

1. Leszek Kordylewski (Pollando);
2. Teruo Matumoto (Japanujo);
3. Seizi Kamiyama (Japanujo).

Kuraĝiga premio:

4. Saĉiko Momoki (Japanujo).

ARĜENTA SPRONO DE KOKO

T. Nakamura (Japanujo) pro lia verko "Enciklopedieto Japano".

INTERNACIA SOMERA UNIVERSITATO

Tre gravan parton de la oficiala kongresa programo konsistigas la prelegoj de la Internacia Somera Universitato, ĉar ili samtempe kontribuas al du celoj: al la ĝenerala klerigo de la kongresa publiko pri kulturaj kaj sciencaj temoj, kaj al la evoluigo de la faka lingvaĵo de Esperanto. La ĉi-jara sesio estis la 18-a laŭ la postmilita formo. Kiel emfazis prof. Hidemiti Oka, la ĉi-jara rektoro de ISU, en sia inaŭgura parolado, ne estis malfacile trovi kongreslandajn prelegantojn, ĉar japanaj sciencistoj tre forte sentas la lingvan problemon.

La oficiala programo enhavis kvar prelegojn de japanoj. Prof. F. Egami, eminenta membro de la Japana Scienca Konsilantaro kaj aliaj fakaj asocioj, klopodis klarigi "Kio estas la molekula biologio". Prof. Masao Suzuki, medicinisto-fiziologo, pritraktis la temon "Elektreco kaj vivaĵoj". Prof. S. Kawamura, kiu ankaŭ pasintjare prelegis en Hago, kreis internacian apetiton por "Sojoj kaj sojproduktoj kiel japanaj manĝaĵoj", kaj Naomiti Oka, profesoro pri kompara psikologio, mirigis multajn ĉeestantojn per filmitaj eksperimentoj pri la "Intelektro de orangutango".


El la kvar eksterlandaj prelegantoj, du bedaŭrinde ne povis ĉeesti. Tamen la prelegon de prof. Lapenna pri "Dudekjara evoluo de Unuiĝintaj Nacioj" (jam koncize presitan en nia aŭgusta eldono) kompetente prezentis d-ro C. Minnaja. Du biologiaj prelegoj — de prof. Støp-Bowitz pri "Ĉu organismoj travivis la glaciepokon en la nordo?" kaj de prof. Ralph A. Lewin pri "Algoj" kompletigis la serion.

La prelegojn de ISU, kiujn en multaj okazoj ilustris lumbildoj kaj aliaj helpiloj, vizitis meze cento da kongresanoj. Ekster la oficiala serio okazis ankaŭ prelego de prof. Tadao Umesao, profesoro pri socia antropologio de la Universitato de Kioto. Parolante pri "Komprenoj kaj miskomprenoj pri japana kulturo" li speciale aludis al la kongresa teatraĵo "Kataki — Malamiko". La plenaj tekstoj de la prelegoj de ISU aperos laŭ la eblecoj en "Scienca Revuo", "Medicina Internacia Revuo" kaj "Monda Kulturo".

ALIAJ ARANĜOJ DUMKONGRESAJ

Fakajn kunsidojn raportas la koncernaj fakaj gazetoj: de TEJO, UMEA, KELI, IKUE, STELO, MEM, SEL, LESS, BLE, ISAE, UHA (Oomoto), militrezistantoj, blinduloj, veteranoj, kooperativistoj, mondfederalistoj, literaturistoj, interstenistoj kaj virinoj. Okazis ankaŭ prelego de Martinus-Instituto. La Akademio de Esperanto kunvenis private.

Diservojn katolikan kaj protestantan partoprenis respektive 180 kaj 120 kongresanoj. En la katolika meso, kiun gvidis sac. A. Beckers, ĉiuj tekstoj estis en Esperanto — la unuan fojon en la historio de la Universalaj Kongresoj. Al la protestantoj predikis pastro Burkhardt.



La (ankoraŭ ne ŝargita) prezida tablo de la Kongresa Bankedo

La Internacia Ekzameno bedaŭrinde ne povis okazi pro la simpla fakto, ke neniuj kandidatoj anoncis.


Distraj aranĝoj ampleksis Interkonan Vesperon, sukcesan Balon (ĉi-foje kongresfinan), 410-personan Bankedon kun eŭropstila enhavo sed japanstila ĉirkaŭaĵo, Junularan Vesperon kun du orkestroj por dancado, ĉiutagajn prezentojn de dokumentaj filmoj kun Esperanta komentario, kaj la perfekte organizitajn ekskursojn: ĉiutage tra Tokio kaj jaŭdon al Nikko kaj Hakone.

En la kongresejo (ideala) troviĝis, krom la kutimaj giĉetoj kaj la standoj de Nov-Zelando, Ĉina E-Ligo kaj Martinus-Instituto, unika volontula servo de la Tokia junularo por helpo kaj gvidado de eksterlandanoj.

Geedza renkontiĝo ĉe la akcepto de la urbestro: maldekstre s-ro Grattapaglia, redaktoro de Itala Esperanto-Federacio, kun s-ino Grattapaglia dekstre s-ro Helmuth, prezidanto de Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko kun s-ino Helmuth.



MEMORINDA JAPANA VESPERO



Skribante pri la Japana Vespero de la oficiala programo oni vere ne scias, kion plej emfazi: ĉu la harmonion de koloroj, ĉu la ekzotikon de la unua parto, neofta sperto eĉ por japanoj mem, ĉu la perfekte fluan kaj simpatian komen-tariadon de s-ino Yukiko Isobe (mem altranga dancistino).

Adekuate priskribi por neĉeestintoj la trank-vile-mezuritan komponon de la antikva japana muziko, kiun ludis gagako-muzikistoj instruitaj ĉe la Imperia Kortego, signifus komenci per represo de la detalaj historiaj-teknikaj klarigoj el la programkajero. La samo validas ankaŭ por la muzikaĵo "Maro en printempo" kaj por la japanaj dancoj de Su Hanajagi kaj ŝia trupo. Al okcidentano, nekompetenta por faka pri-takso, aparte impresis la stile fiksitaj, kvazaŭ ritaj manmovoj de la gagako-muzikistoj, kaj la etoso de trankvila disciplino, kiun iel apogis ankaŭ la bruno, nigro kaj blanko de iliaj kostumoj.

Guante la riĉan tonon de ŝakuhaĉo (s-ro Kōzan Kitahara) kaj variajn humorojn de la kotoo (s-ino Kijoko Mijagi) per ilia dueto, oni samtempe povis multon interesan observi pri la apartaj ludo-teknikoj. Muzikaĵoj el la 17-a kaj 19-a jarcentoj akompanis, kun sol- kaj ĥor-kantado, la dancojn duopan kaj dek-duopan (foto).

La paŭzo signis transiron al arto-formoj pli rekoneblaj por tiuj edukitaj laŭ okcidentaj muzikaj tradicioj. Temis pri moderne kom-ponitaj kantoj, kune kun unu du popolaj arioj, en vigla interpreto de Tokia vira ĥoro "Lieder-tafel Verein" kaj pli milda de la sopranoj M. Hirai kaj M. Hirakawa. Senbezone aldoni, ke ĉiuj kantoj estis en Esperanta traduko.

*La urbestron de Tokio salutas
manpreme la ĝenerala sekretario.
Maldekstre: prof. Seiho Nishi.*

EKSTERAJ RILATOJ

La 29-an de julio reprezentantoj de UEA, de la LKK kaj de Japana Esperanto-Instituto vizitis la ĝeneralan sekretarion de la Japana Nacia Komisiono por Unesko ĉe la Ministrejo de Eduko. Okazis duhora diskuto pri la Kon-greso kaj pri la lingva problemo ĝenerale.

La urbestro de Tokio, s-ro Ryotaro Azuma, kiu bedaŭrinde ne povis persone ĉeesti la Inaŭ-guron, tamen povis renkontiĝi kun preskaŭ 300 kongresanoj el kvardeko da landoj la 3-an de aŭgusto, kiam li invitis ilin al neformala regalo en vasta japanstila ĝardeno Kiyozumi Teien. Salutparoladon de la urbestro respondis s-ro Holmes.

Ankaŭ pluraj ambasadoj montris sin bone informitaj kaj plue scivolaj pri la Kongreso per invitoj al sialandaj kongresanoj kaj aliaj. La ambasadoj germana, hungara, itala, pola, sveda kaj usona aranĝis oficialajn akceptojn.

La interesiĝo ĉe la japana gazetaro estis pli limigita, sendube pro la tre granda nombro de kongresoj, kiujn la japana ĉefurbo regule gastigas. Tamen aperis regule la bultenoj de la Kongresa Gazetara Servo en Esperanto kaj en la japana lingvo, kaj aro da gazetoj, inter kiuj kelkaj tre gravaj, transprenis informojn aŭ presigis intervjuojn. La 26-an de julio okazis kolortelevida intervjuo kun s-ro Miyamoto masao (gajninto de unua premio en la Belartaj Konkursoj), KKS Pompilio, LKK-ano Isiguro kaj deko da diverslandaj kongresanoj. Ankaŭ partoj de la inaŭgura solenaĵo aperis en tele-vido. Tiel milionoj da japanoj eksciis pri la Kongreso kaj pri la Internacia Lingvo. Ankaŭ la itala, brita kaj pola radioj surbendigis inter-vjuojn.



Ligo kun la Unua Universala Kongreso

La plej malgaja momento de ĉiuj kongresoj, kiel konstatis s-ro Holmes en la Solena Fermo, alportis ĉifoje samtempan ĝojon kaj kontenton pro la elstara sukceso de ĉiuj aranĝoj kaj la utila laboro plenumita. Al plena salono la prezidanto tutunue prezentis la solan kongresanon, kiu partoprenis ankaŭ en la Unua Universala Kongreso en 1905 kaj havis nun la feliĉon ĉeesti la 50-an. Dum varma aplaŭdo li transdonis kun la bondeziroj de la Estraro donacekzempleron de la Dia Komedio al s-ro Emile Gasse.

Sekvis honorado al ĉiuj gajnintoj en konkursoj: la junaj oratoroj (anoncis J. Umeda), la premiitoj de Belartaj Konkursoj (anoncis V. Sadler) kaj de la Foto-Konkurso (anoncis G. G. Pompilio). Sur la podio brilis nova pokalo, aljuĝota en estontaj jaroj al la premiito "Nova Talento" de la Belartaj Konkursoj. Donacis ĝin s-ro G. Harabagiu, honora membro de UEA, memore al sia frato Henry Harabagiu, iama ĉefdelegito de UEA en Rumanujo, kiu pereis en bombatako dum milito. (Aklamo)

Leviĝis nun la ĝenerala sekretario, s-ro Becker, por raporti al la Pleno la rezultojn de la diversaj laborkunsidoj (ĉar "eĉ jubilea UK estas laboraranĝo") — de la Estraro kaj Komitato, de la Sekcioj kaj Ĝeneralaj Kunvenoj. Aparte li atentigis pri la deficito de la

buĝeto de UEA kaj la neceso varbi pli da individuaj membroj. Precipe la japanaj esperantistoj, kiuj tiel bone kunlaboris en la subskribkolektado, montru sian solidarecon ankaŭ per aliĝo al UEA. Fine li voĉlegis la Kongresan Rezolucion, jam aprobitan de la Komitato kaj Unua Labora Sekcio. Forta aplaŭdo konfirmis ankaŭ la ĝeneralan aprobon.

Dankojn al ĉiuj kunlaborintoj de la UK enkondukis la KKS, substrekante la perfektan kunlaboron de ĉiuj anoj de LKK: profesoroj Nishi kaj Nišiumi, s-ro Isobe, kaj s-roj Hori, Mijake, Hukuta, Matumoto, Nakagaŭa, Satojoŝi, Ŝoji, Takagi kaj Isiguro. La dankojn s-ro Holmes eĉigis kaj vastigis por inkluzivi s-ro Pompilio mem, f-inon Vermaas kaj la Centran Oficejon, la 75 helpantojn de LKK kaj ĉiujn aliajn, kiuj iel kontribuis al la sukceso. Respondis unue vic-prezidanto Carlén por danki la spertan gvidadon de s-ro Holmes ("Ni havas vere eminentan prezidanton en nia Honora Prezidanto") kaj s-ro Hori nome de LKK.

"Inspira ekzemplo"

Transprenante de s-ro Isobe la kongresan standardon, s-ro Szerémi-Tóth en la nomo de Hungara E-Asocio esprimis la esperon, ke la 51-a UK en Budapeŝto malfermos novan epokon. Elokvente ŝi vortigis la sentojn de ĉiuj, nomante la tuj finiĝontan Kongreson "inspira ekzemplo" por la estonteco.

REZOLUCIO

La 50-a Universala Kongreso de Esperanto okazinta en Tokio de la 31-a de julio ĝis la 7-a de aŭgusto 1965 en la ĉeesto de 1710 reprezentantoj el 46 landoj, kies laboroj estis grandparte dediĉitaj al la Jaro de Internacia Kunlaboro;

KONSTATAS, ke ĉiuj landaj asocioj kaj specialigitaj organizaĵoj apartenantaj al Universala Esperanto-Asocio kaj ĝia tuta membraro en 83 landoj favore akceptis la Rezolucion de la 49-a Universala Kongreso de Esperanto en Hago (1964), per kiu ĝi decidis doni sian plenan apogon al la klopodoj de Unuiĝintaj Nacioj progresigi la kunlaboradon inter la popoloj kun la celo disvasti internaciajn tensiojn kaj firmigi la mondan pacon;


NOTAS kun kontento, ke la plenumado de la ampleksa Laborplano de Universala Esperanto-Asocio, ellaborita speciale por doni kiel eble plej efikan apogon al la celoj de la JIK, jam en la unuaj monatoj de realigado donis rimarkindajn rezultojn, kiuj manifestiĝis, unuflanke, en amasa diskonigado de la JIK, de la signifo kaj laboro de Unuiĝintaj Nacioj kaj diversaj specialigitaj organizaĵoj per artikoloj, prelegoj, seminarioj, radio-disaŭdigoj kaj

aliaj metodoj, kaj aliflanke en ĉiudirekta konscia intensigo de internacia kunlaborado precipe per novaj elstaraj publikaĵoj en Esperanto, unuavice en la Serio Oriento-Okcidento, per vastigo de internacia korespondado, interŝanĝado de sonbendaj programoj, prelegoj de alilandanoj, interŝanĝado de edukaj filmoj kaj diapositivoj kaj en diversaj aliaj manieroj;

ALVOKAS ĉiujn Esperanto-organizaĵojn kaj ĉiujn unuopulojn, kiuj parolas la Internacian Lingvon, unuavice la juristojn, profesorojn, instruistojn kaj ĵurnalistojn, daŭrigi kaj intensigi ĝis maksimumo la agadon konforme al la Laborplano, tiel ke la rezultoj fine de la jaro estu ankoraŭ pli signifaj;

ALTIRAS la atenton de Unuiĝintaj Nacioj al la fakto, ke la lingvo-diverseco prezentas unu el la plej gravaj obstakloj al vastigo kaj profundigo de kunlaborado inter la popoloj; opinias, ke Unuiĝintaj Nacioj devus studi tiun gravan problemon kaj la radikalan solvon, kiun prezentas la neŭtrala Internacia Lingvo (Esperanto) kaj esperas, ke Unuiĝintaj Nacioj donos la merititan konsideron al tiu demando;

ESPRIMAS al la Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, lia ekscelenco U Thant, sian simpatian kaj admiran pro la sindediĉo al la afero de internacia kunlaboro kaj monda paco.



LA JUNA VIVO

**Oficiala organo de
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
Materialojn por "La Juna Vivo" sendu al
H. Bakker, Kastelenstraat 231,
Amsterdam Z, Nederlando**

Por tuj diri tion: du kongresanoj, kiuj jam estis partoprenintaj en 11 kongresoj de TEJO, senhezite deklaris, ke la 21-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO en Otsu estis la plej bela el ĉiuj.

Tion ĉefe kaŭzis nek la nombro de 250 partoprenantoj el 15 landoj de 4 kontinentoj, nek la en si mem jam unika fakto ke TEJO unuafoje kongresis ekster Eŭropo kaj tiel faris la unuan paŝon al vera tutmondeco, sed la eksterordinara kaj en tia intenso ĝis nun ne spertita amika kaj kortuŝa atmosfero. Ke tion plej forte influis la popola karaktero de la japanoj, jam rimarkis la lacigita fluginto kelkajn horojn post sia alveno en tiu lando.

La kongresejo

Ĝi estis la Ŝtata Centro de Junulargastejoj konstruita antaŭ 5 jaroj kaj situanta en mirinda regiono kun belega panoramo de la urbo Otsu kaj la lago Biŭa – la plej granda kaj impona lago de Japanujo. Sekve jam la medio, en kiu okazis la kongreso, aŭguris ĝian sukcesan trapason. En frua posttagmezo de la 8-a de aŭgusto kolektiĝis jam la plej granda parto de kongresanoj, kiujn la LKK, sen la kutimaj atendigadoj, rapide kaj glate enloĝigis en la 8-litajn ĉambrojn.

Interkona Vespero kaj Balo estis ĉi-foje kunfanditaj; vervaj kaj multkoloraj vestitaj muzikistoj helpis kunigi la gedancantojn sur la teraso de la gastejo, kaj ĉiuj jam en tiu unua vespero eksupozis, ke pliaj plezuroj ilin atendas.

La Malferma Soleno

– okazis la 9-an de aŭgusto en la Urbana Domo de Kulturo en ĉeesto de rekorda nombro da oficialuloj, unuavice la guberniestro de Ŝiga, Kjuĵiro Taniguĉi, kaj la urbestro de Otsu, Zeniĉi Niŝida, kiuj jam matene estis akceptintaj en siaj oficejoj kelkajn IJK-reprezentantojn. La Honora Prezidanto de TEJO, Günther Becker, unue donis la parolon al la LKK-prezidanto Joŝikazu Takeuĉi, kiu per emociaj vortoj salutis la kongresanaron. Post salutparoladoj de la guberniestro kaj de la urbestro kaj de la prezidanto de la loka Esperantogrupo, d-ro Ossaka, kaj post prezento de pli ol 15 altrangaj civitanoj de Otsu sekvis la naciaj reprezentantoj. Salutis gejunuloj el Aŭstralio, Britujo, Danlando, Francujo, Germanujo, Italujo, Japanujo, Koreujo, Novzelando, Pollando, Svedujo kaj Usono, ĉiuj kore aklamitaj.

La festparolado de Carlo Minnaja, ĝenerala sekretario de TEJO adekvate finis la festan karakteron (ne ĝenatan de kantado de la

PLEJ BELA KON

Himno) de la Inaŭguro, kaj liaj atentigoj pri la unikeco de tiu ĉi kongreso ne bezonis apartajn pruvojn.

Ekskursoj

– okupis grandan parton de la programo. Kongreso okazanta en la centro de la malnova japana kulturo ne povis tion preteratenti. Krom boatekskurso sur la lago Biŭa kaj vizito al la templo Iŝijama, kie bonzo ne nur nin gvidis sed eĉ ofertis akvon por manlavo, okazis du tuttagaj ekskursoj unu al Kyoto kaj la monto Hiej kaj la alia al Nara. Eĉ supraĵa konanto de Japanujo scias aprezi la signifon de tiuj lokoj, kaj la kongresanoj transprenis volonte ĉiujn streĉojn (precipe la grandan varmegon) por ke nenio bela restu ne admirita aŭ ne fotografita.

Klerigaj programeroj

– sukcesis eviti troan turisman karakteron de la semajno: Kenĵi Takuma klarigis la studentan movadon en sia lando kaj Victor Sadler parolis pri "Esperanto-literaturo kaj naciaj karakteroj beletristikaj". Ĝenerala kunsido de TEJO estis aparte grava ĉar multaj japanoj estis evidente ne sufiĉe informitaj pri la junulara sekcio de UEA; ilia interesiĝo montris ke tiu nescio ne estis indiferenteco. Kiel komuna aranĝo kun la postkongreso la 11-an de aŭgusto posttagmeze kaj vespere kolektis grandan publikon la Internacia Belarta Festivalo, kies prelegoj, koncerto, dancprezentoj kaj teatraĵoj montris elstaran nivelon. Malofte antaŭa IJK vidis tiom da politikaj diskutoj, sed kiel oficiala programero okazis nur unu ne tre fruktodona diskutado "Krizo de porpacaj movadoj". En antaŭa vespero la kortuŝan efikon de filmo pri Hiroŝima iom ĝenis malĝustaj konkludoj de iu sonbendo. Speciale la eksterlandanojn allogis konkurso de japana kaligrafio kaj leciono pri la japana paperfaldarto.

Oratora konkurso

Ses gejunuloj ekzameniĝis sub la okuloj de juĝkomisiono (G. Becker, C. Minnaja, N. Ŝoji). Unuafoje la unuan premion gajnis japano: Kenĵi Naemura, kiu oratoris pri "Moderna tekniko kaj homa naturo". La duan, respektive trian premion ricevis Dieter Kleemann, Germanujo ("Kion mi atendis sperti en Japanujo"), kaj Michael Lamb, Anglujo ("Kiel eblas la renkontiĝo de la Oriento kaj Okcidento").

Kulminoj

– ne ekzistis en Otsu, ĉar la tuto estis unu kulmino en antaŭe nevidita harmonio. Ni notu la vastan subtenon de oficialaj instancoj: la loka Rotaria Klubo donis bankedon dum kiu kantis la urbestro mem, en tre gaja atmosfero. La Junulara Ĉambro invitis al vespera renkon-

GRESO DE TEJO

tiĝo en la idilie situanta templo En'man'in' kie oni prezentis te-ceremonion, japanan muzikon trankvilan kiel ankaŭ neatendite temperamentan, kaj rapidege faritajn karikaturojn pri diabloj kaj diversaj nenormalaĵoj.

Komitato de TEJO


— ĉi-jare ne havis la necesan kvorumon tiel ke ĝiaj decidoj en Otsu ankoraŭ bezonas ratifon. La Estrara Raporto kaj la Raporto de la Kasisto estis jam vaste disdonitaj en Tokio, por informi ankaŭ homojn ekster la Komitato pri la pasintjara agado kaj precipe pri la malbona financa situacio. La nove proponita Estraro konsistas el: Ivo Osibov (Jugoslavio), prez., Marek Pietrzak (Pollando) kaj Humphrey Tonkin (Usono), vic-prezidantoj, Carlo Minnaja (Italujo), ĝen. sekr., Ulrich Lins (Germanujo), kasisto, Hans Bakker (Nederlando), Joŝimi Umeda (Japanujo) kaj Svobodan Zlatnar (Jugoslavio), estraranoj. Kun granda bedaŭro estis akceptita la demisio de la longjara vic-prezidanto Simeon Simeonov, al kiu TEJO ŝuldas multan dankon.

Distraĵoj

Ni nomu ankaŭ la sportajn konkursojn pri teniso, tabloteniso, kaj naĝado en kiuj la japanoj — kiel jam dum la Olimpiko — atestis sian dominan rolon. Tamen la eŭropanoj ne komplete subakviĝis. Bela ideo de la LKK estis interŝanĝo de donacetoj kiuj transiris el la mano de nekonata donacinto al kontenta posedanto. Granda surprizo ne mankis en tiu kongreso: la ĉarmo de la japaninoj estis unu el la ĉefaj temoj (se ne la ĉefa mem) kaj ĉiuj vetintoj certis ke "Miss Esperanto" estos unu el tiuj, kvankam la elekto inter tiom da ĉarmulinoj ŝajnis ege malfacila. Nu, ial — ĉu pro troa japana ĝentileco kontraŭ la gastoj? — venkis f-ino Renée Triolle (Francujo). "Mister Esperanto" unuafoje elektita fariĝis Jan Milld (Svedujo). Kunveno ĉirkaŭ kampfajro solene kaj amuze fermis la cirkon de ĉiutagaj ĝuoj. En tia situacio Carlo Minnaja, tenanta la brulantan torĉon, trovis la verŝajne sole taŭgajn vortojn pri paco, espero, amo, amikeco, kaj post variaj prezentoj sub la lumo de la fajreroj ĉiuj manpreme adiaŭis unu la alian.

Konklude

Apenaŭ eblas priskribi la unikan etoson kiu regis dum la 21-a IJK de TEJO en Otsu, nek la ĉiurilate afablan sintenon de la LKK, nek la perfektan organizon kiu allasis eĉ ne etajn malglataĵojn. La organizintoj ne kulpis, ke ĉio jam devis finiĝi je la 21-a horo, kaj ke precize je la 22-a la lumoj estingiĝis. Feliĉe ĉiuj ne ribelis pro tio ke la ĉefularo de la gastejo ne sufiĉe aprezis la okazon. Tion kontraŭe komprenis ja la gazetaro kaj la televido, kiu lasta elsendis kvaronhoran filmraporton. Kun granda



Ankaŭ en la Universala Kongreso en Tokio la junularo povis interkonatiĝi dancante.

bedaŭro la kongreso konstatis la neĉeeston de dudeko da koreoj, kiuj aliĝis sed ne ricevis japanajn enirviziojn. Nur unu ĉeestis la tutan semajnon kaj dua alvenis en la antaŭlasta tago.

La Ferma Kunsido, la 15-an de aŭgusto, estis tro oficiala por povi kontentige fermi tian kongreson, sed la finaj adiaŭoj antaŭ la aŭtobusoj en Otsu, aŭ trajno en Kioto aŭ aviadilo en Tokio ne volis ĉesi: lastaj manpremoj, rapidaj reciprokaj fotografiĝoj, senlaca salutado, kaj finfine nur kelkaj "larmoj kaj larminoj" — jen kiel devis finiĝi eĉ la plej bela semajno.

Ulrich Lins

TELEGRAMO AL U THANT, ĝenerala sekretario, U.N.: 230 personoj el 15 landoj partoprenintaj la 21-an kongreson de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo en Otsu, Japanujo, sincere gratulas al vi pro la farita laboro por la mondpaco kaj bondeziras novajn konkretajn sukcesojn en via agado.

S-ro A. E. Gončarov, p.k. 11, Barnaul 99, estas nomita peranto de TEJO en Sovetunio, kaj donas informojn pri eblecoj de abono je "Kontakto" kaj de membriĝo kiel JMA kaj MAK.

Kiu povas disponigi al la red. de LJV malhaveblajn ekzemplerojn de "Kontakto" — vintro 1964 (blua kovrilo)? La tuta stoko elĉerpiĝis kaj ni urĝe bezonas ankoraŭ kelkajn ekzemplerojn por reprezentaj celoj!

esperanto
sept./okt. 1965

KULTURA UNUECO DE EŬROPO



La Prezidanto de Aŭstrujo, s-ro Franz Jonas, akceptas la Prezidanton de UEA (dekstre)

Guste tri semajnojn antaŭ la Universala Kongreso, en Vieno komenciĝis la Eŭropa Esperanto-Konferenco. Efektive, la forteco de la Esperanto-movado en Eŭropo estas tia, ke la okazigo de Universala Kongreso en alia kontinento nepre necesigas eŭropan konferencon. Ĉu venos tempo, kiam ankaŭ konferencoj tutazia, tutaŝtata, tutamerika estos normala afero?

En ĉiu okazo la sukceso de la Eŭropa Konferenco, kun siaj 500 partoprenantoj el 22 landoj, el kiuj 380 el ekster Aŭstrujo, malgraŭ la amasa aliĝo al la U.K. en Tokio, klare pruvis ke ekzistas bazo ankaŭ por tia aparta unu-kontinenta kongreso.

El ĉiuj aranĝoj de la Konferenco klare elstaras la akcepto ĉe la Prezidanto de la Respubliko, Franz Jonas, la 14-an de julio (vidu la raporton en "Esperanto", aŭgusto, p. 160), kiu donis al la tuta aranĝo apartan prestiĝon.

Agi ĉe eŭropaj organizaĵoj

El interna vidpunkto la laboroj centriĝis je ĝenerala kunveno laŭ la temo "La kultura lingva problemo de Eŭropo", kiun gvidis prof. Lapenna. Ĝiaj konkludoj rilatis ĉefe al la neceso pli efike agi ĉe la diversaj eŭropaj interŝtataj kaj neregistaraj organizaĵoj, ĉe kiuj

la lingva problemo estas rekte kaj dolore konata. Krome, serio da prelegoj kun diskuto pritraktis la Internacian Lingvon en rilato al literaturo (s-ro Steiner, prizorganto de la Internacia Esperanto-Muzeo en la Nacia Biblioteko), al religioj (pastro S. Siedl), al la internacia politiko (prof. I. Lapenna), al la turismo (E. Werner) kaj al la junularo de Eŭropo (d-ro K. Perko). Al tiu ĉi kategorio apartenas ankaŭ la festparolado de la Prezidanto de UEA, kiu difinis la rolon de la Konferenco mem kaj la ĉefajn taskojn, kiuj hodiaŭ frontas la internacian Esperanto-movadon, precipe en ligo kun la Jaro de Internacia Kunlaboro.

Kvar-punkta rezolucio, kiun aklame akceptis la ferma kunsido, atentigis pri la kultura unueco de Eŭropo malgraŭ la naciaj kaj precipe lingvaj diferencoj kaj alvokis al la registaroj de eŭropaj ŝtatoj kaj al eŭropaj institucioj pristudi la lingvan problemon kaj la solvon per Esperanto.

Fakaj kunvenoj de MEM, ISAE, ILEF, ESLI, IKUE kaj kontraŭalkoholuloj, piano-konzerto de F. Merrick, filmo-prezentoj (inkluzive de "Angoroj") kaj aro da allogaj ekskursoj plenis la ceteran programon.

Aparte notinde estas, ke oficialajn delegitarojn sendis Sovetunio kaj la Germana Kulturligo (Orienta Berlino).

BELARTA KAJ HUMANECA FESTIVALO

internacia festivalo
de oomoto, kameoka

Inter la postkongresaj aranĝoj, el kiuj parto estis komuna inter la Postkongresa Ekskurso kaj la 21-a IJK de TEJO (vidu p. 172-3), la Internacia Festivalo de Oomoto elstaras per sia densa kultura kaj humaneca enhavo. En malpli ol tri tagoj (13-15 aŭgusto) festivalanoj el pli ol 20 landoj povis rigardi, aŭskulti kaj diskute partopreni programon, kies amplekso ordinare sufiĉus por plena semajno. Nur la perfekta organizo kaj atenta prizorgo de la gastoj fare de la Oomoto-centranoj ebligis ĉion ĝui sen laciĝo.

Oomoto, fondita fine de la pasinta jarcento, estas unudiisma, universalema religia movado kun programo de sociaj reformoj. Pri ĝia historio kaj kredaro la festivalanoj povis informiĝi el du prelegoj. Sed ĝia plej grava trajto rilate al la Internacia Festivalo estis sendube la toleremo, dank' al kiu ĉiu — ĉu budhano, hinduo, kristano, mahometano aŭ kia ajn — sin sentis en sia hejmo. Estis karakterize, ke por gvidi diskutgrupojn pri "Religioj kaj la homa civilizo en la Okcidento kaj en la Oriento" la organizintoj elektis budhanon, senkredulon, martinusanon ... nur ne oomotanon! Same karakterize, ke ĉiuj diskutgrupoj emfazis la toleremon en siaj konkludoj. Prelegoj pri "Religioj en Japanujo" (prof. Umesao) kaj "Kontakto kun la spiritmondo" (s-ro Holmes) plue vastigis la temon.


El belarta vidpunkto la Festivalon memorin-

digis du spektaklaj prezentaĵoj: de no-dramo kaj de uta-festo. La unua (pri kiu oni legu ĝeneralaĵojn en "Enciklopedieto Japano") pro sia disciplinita malrapideco kaj simpla enhavo estis malfacile digestebla por okcidentanoj — kiel, cetere, ankaŭ por la plimulto de japanoj. Sed la *intenco* maleksisto, la koncentritaj movoj kaj rigida, kolorplena beleco komunikis kvazaŭ iun kvintesencon de la japana antikva arto.

Simile oni povus diri pri la uta-festo de poezio kaj danco laŭ ŝintoisma ritaro. Ankaŭ ĝi sentigis tradiciojn tre malnovajn kaj tute fremdajn al la moderna kulturo de Japanujo. Ritaj dancoj kaj kanta deklamo de utaoj akompanis la deklamadon (laŭ okcidenta maniero) de premiitaj poeziaĵoj. La altaj premioj de la internacia konkurso (vidu "Esperanto", majo, p. 93) allogis 171 verkojn de 73 aŭtoroj en 24 landoj. Ĉefpremiojn gajnis Antonia-Maria Albert (Germanujo), Masao Uejama (Japanujo), Gé Roelofs (Nederlando).

Mencii ĉiujn programerojn ĉi tie ne eblas, sed apud la gastamo de la Oomotanoj du impresaj spertoj restos eble plej longe en ĉies memoro: la belegaj pejzaĝoj de Hozu-rivero, laŭ kies rapidfluo la vizitantoj boate fordrivis de siaj multaj novaj amikoj, kaj la popolo-tradiciaj rondodancoj somervesperaj, en kiujn la eksterlandanoj estis akceptitaj kiel malnovaj intimuloj.

Partoprenintoj de la Internacia Oomoto-Festivalo fotografiĝas sub varma suno



mallongaj novaĵoj

LAŬLANDE

Danlando

• La bela speciala gronlanda numero de la revuo "Norda Prismo" estas senpage ricevebla el ĉiuj ambasadejoj de Danlando.

Nederlando

• La 12-an de septembro festis sian 70-jariĝon s-ro Andreo Cseh, la konata pioniro de rektametodaj kursoj de Esperanto. Jam en 1920 li ellaboris sian instrumentodon — nuntempe konata per lia nomo — al kiu hodiaŭ miloj da personoj ŝuldas sian scion de Esperanto. Samtempe aktualiĝis la 35-a datreveno de la Internacia Esperanto-Instituto en Hago, sendependa kultura fondaĵo kiun s-ro Cseh iniciatis en 1930 kune kun s-ino Julia Isbrücker. Pro ambaŭ jubileoj plej korajn gratulojn!

nekrologoj

SIBE SIPKE DE JONG DZN.

Je la 20-a de julio forpasis, 61-jara, en la frisa urbeto Sneek, Nederlando, s-ro S. S. de Jong el Tjerkwerd. Malgraŭ paralizo, kiu trafis lin je 18-jara aĝo, kaj kiu ligis lin en la lastaj jaroj daŭre al la lito, li kompilis kaj prizorgis skriban E-kurson, estis Delegito de UEA, gvidis Esperantan radio-servon, kunlaboris en "Nederlanda Esperantisto" kaj kompilis la libron "Frisaj Rakontoj". Ĉe la kremacia solenaĵo s-ino E. Kervers-van-Tholen parolis en la nomo de UEA.

OTELLO NANNI

La 1-an de julio mortis d-ro inĝ. of. kav. Otello Nanni, kunfondinto de la Itala Instituto de Esperanto kaj de la E-grupo "A. Tellini", kaj Delegito de UEA en Bologna, Italujo. Li estis 73-jara. Lerninte Esperanton en 1909, li ofte partoprenis kongresojn naciajn kaj internaciajn.

GENERALO MALRAISON

Forpasis em. generalo Malraison de la franca armeo. Li lernis Esperanton en 1909 kaj ĉiam subtenis la movadon.

Vjetnamujo

• Post invitita prelego de Dao anh Kha en la Vjetnama Pedagogia Universitato en Hanojo antaŭ lingvistoj kaj respondeculoj de la Universitato, okazos speciala kurso por la respondeculoj kaj ekspozicio por la studentoj.

LAŬFAKE

Filozofio

• La estraro de Martinus-Instituto decidis en aprilo oficialigi Esperanton por siaj internaciaj rilatoj. Ĝia centro en Kopenhago jam regule eldonas librojn en Esperanto.

Kino

• "Inkubo" nomiĝas la unua tute esperantlingva drama filmo produktita en Hollywood. Reĝisoras Leslie Stevens, ĉefrolas William Shatner kaj Allyson Ames. La filmo havas scienco-fikcian temon kaj, se ĝi sukcesos en usonaj kinejoj, aperos ankaŭ eksterlande, kun subtitoloj laŭ la lando.

Politiko

• En Munkeno ekaperis grandformata 4-paĝa gazeto "Lanterno" (Infanteriestr. 12/I., 8 München, 12., Germanujo). Jarabono por ses eldonoj kostas 6 g.m. En la unua eldono: "La kazo Mihajlo Mihajlov", "Kio restis de la socialista realismo?", k.a.

Radio

• Ekzistas ebleco ke la Hungara Radio regule dissendos en Esperanto pro la 51-a UK en Budapeŝto, se multaj aŭskultantoj en eksterlando tion skribe petos. Adreso: Hungara Radio, Budapeŝto VIII, Bródy Sándor u. 5-7. Jam okazis nacilingvaj elsendoj pri la Tokia UK kaj la Viena Konferenco.

Turismo

• Sveda E-ista Junulara Unuiĝo (Fack 101, Höör, Svedujo) jam eldonis suplementon al sia listo de senpage riceveblaj turismaj kaj komercaj prospektoj en Esperanto. (Vd. "Esperanto" februaro p. 33). Entute nun temas pri ĉ. 100 prospektoj kun adresoj.

propono al
unuiĝintaj nacioj

LAŬLANDA STATO DE LA SUBSKRIBO-KOLEKTADO

El la jena tabelo oni vidas, en kiuj landoj oni kolektis, **proporcie al la loĝantaro**, plej multe da subskriboj individuaj por la Propono al Unuiĝintaj Nacioj. La ciferaĵoj kolumnoj indikas la nombron de subskriboj ricevitaj en la C.O., la loĝantaron de la lando (miliono) kaj la proporcion (elmiloj). Se el Japanujo estus jam ricevitaj la subskriboj kolektitaj de Oomoto, ĝi okupus la 6-an lokon. Sur la 1-a loko starus Gronlando, se ĝi ne estus parto de la Dana Reĝlando.

Stato je la 26-a de aŭgusto

Lando	Subs.	Loĝ.	%
1. Bulgarujo	61 940	8,1	7,64
2. Monako	112	0,022	5,09
3. Hungarujo	25 875	10	2,58

4. Hispanujo	5 786	30	1,92
5. Belgujo	15 945	9,3	1,71
6. Islando	204	0,19	1,07
7. Svedujo	8 074	7,6	1,06
8. Ĉeĥoslovakio	11 355	14	0,81
9. Svislando	4 361	5,6	0,77
10. Aŭstrujo	5 453	7,1	0,76
11. Finnlando	3 202	4,6	0,69
12. Nederlando	8 272	12	0,68
13. Danlando	2 820	4,7	0,60
14. Jugoslavio	10 398	19	0,54
15. Malto	179	0,33	0,54
16. Israelo	1 019	2,5	0,40
17. Francujo	14 766	48	0,30
18. Germanujo	21 674	75	0,28
19. Pollando	8 282	31	0,26
20. Italujo	12 057	52	0,23

esperanto
sept./okt. 1965

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo. En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon. Por aliaj horsistemoj vidu la jarlibron 1965, 1-a parto, p. 190-191. Mallongigoj: I = Informoj, P = Parolado, K = Kurso.




Ĉiutage	15.30-16.00	Warszawa, 200m. (1502 kcs), 50.42m. (5950 kcs), 50.04m. (5995 kcs), 48.90m. (6135 kcs), 42.11m. (7125 kcs), 41.99m. (7145 kcs), 41.27m. (7270 kcs), 41.18m. (7285 kcs). P. Pola Radio, Esperantaj disaŭdigoj, Warszawa.
Dimanĉo	11.00-11.30	Pekino, 40.82m. (7350 kcs), 24.88m. (12055 kcs). I. Radio Pekino, Esperanto-fako, Pekino, Ĉinujo.
	12.30-13.00	Pekino, 25.12m. (11945 kcs), 19.89m. (15080 kcs). I.
	16.35-16.50	Roma, 31.33m. (9575 kcs), 25.20m. (11905 kcs). P. Radio Roma, Esperanto fako, Casella postale 320, Roma, Italujo.
	20.05-20.30	Sofia, 48.04m. (6245 kcs), 25.61m. (11715 kcs). P. Radio Sofia, Bulgarujo.
	21.30-21.45	Teresina, 210m. (1430 kcs), 88.63m. (3385 kcs). I. P. Radio Clube de Teresina, Rua Barroso 175, Teresina (Piauí), Brazilo.
	23.30-23.55	Sofia, 49.42m. (6070 kcs), 41.35m. (7255 kcs.). P.
Lundo	00.15-00.45	Muritiba, 216m. (1390 kcs), I.K. Soc. Em. Radiovox, Muritiba (Bahia), Brazilo.
	22.40-22.55	Hilversum, 298m. (1007 kcs) aŭ 402m. (746 kcs). P., N.C.R.V., Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando (nur la unuan lundon de ĉiu monato).
	22.45-23.00	Valencia, 278m. (1079 kcs). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanujo.
Mardo	14.45-15.00	Valladolid, 203m. (1475 kcs), K.I. Radio Valladolid, Hispanujo.
	16.50-17.00	Wien, 577m. (520 kcs), 514m. (584 kcs), 293m. (1025 kcs), 25.45m. (11785 kcs), 16.78m. (17880 kcs). P. Radio Wien Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
Merkredo	6.20- 6.35	Gdańsk, 230m. (1304 kcs). I. Pola Radio, ul. Uphagena 1, Gdańsk, Poll.
	17.45-18.00	Rio de Janeiro, 375m. (800 kcs), 50.08m. (5990 kcs), 30.71m. (9770 kcs), 25.10m. (11950 kcs), 16.78m. (17880 kcs). K. I. Rádio Ministério da Educação, Praça da República 141-A, Rio de Janeiro, Brazilo.
	18.45-19.00	Resende, 196m. (1530 kcs). P. Radio Agulhas Negras ZYP 22, Praça Oliveira Botelho, Resende (Rio de Janeiro), Brazilo.
	23.30-23.55	Bilbao, 264m. (1133 kcs). I. P. Radio Bilbao, Apartado 1117, Hisp.
Ĵaŭdo	8.30- 8.40	Wellington, 49.34m. (6080 kcs), 31.45m. (9540 kcs). I. Radio New Zealand, P.O. Box 2396, Wellington C.1, Nov-Zelando. (nur la lastan ĵaŭdon de ĉiu monato).
	11.30-11.40	Wellington. Ripeto de la programo.
	17.50-18.00	Praha, 233m. (1286 kcs). I. Radio Praha, Disaŭdigoj por Aŭstrujo, Praha, Ĉeĥoslovakujo (nur la lastan ĵaŭdon de la monato).
	20.30-20.45	Volta Redonda, 192m. (1560 kcs). P. Radio Siderurgica Nacional ZYP 26, Volta Redonda (Rio de Janeiro), Brazilo.
	23.05-23.20	Zagreb, 264m. (1133 kcs). P. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.
	23.05-23.20	Beograd, 439m. (683 kcs), 48.78m. (6150 kcs). P. (programo de Zagreb).
Vendredo	20.00-20.30	Pekino, 47.85m. (6270 kcs), 45.70m. (6560 kcs), 40.42m. (7440 kcs), 39.37m. (7620 kcs), 32.12m. (9340 kcs), 30.14m. (9955 kcs). I.
	22.45-22.55	Hilversum, 298m. (1007 kcs) aŭ 402m. (746 kcs), P., V.A.R.A., Poŝtkesto 175, Hilversum, Nederlando.
Sabato	9.45-10.00	Rio de Janeiro, 214m. (1400 kcs), 31.53m. (9515 kcs). K. Radio Roquete Pinto, Rio de Janeiro, Brazilo.
	11.00-11.30	Pekino, kiel dimanĉe.
	11.30-12.00	Niteroi, 240m. (1250 kcs), I.K. Radiodifusora Fluminense, Niteroi (Rio de Janeiro), Brazilo.
	12.30-13.00	Pekino, kiel dimanĉe.
	16.00-16.30	Guatemala, 220m. (1360 kcs), 48.54m. (6180 kcs). I.K. La Voz de Guatemala Guatemala Cd., Mezameriko.
	20.00-20.30	Pekino. Kiel vendrede.
	22.00-22.30	Uberlândia 191m. (1570 kcs), I.K. Rádio Cultura de Uberlândia, Minas Gerais, Brazilo.

NOV-ZELANDA RADIO (N.Z.B.C.) jam sendis al diversaj radiostacioj sonbendigitan programan materialon Esperante priparolatan (Maorian muzikon). La stacioj rajtas uzi Esperanton kiel pontlingvon kaj elsendi la materialon nacilingve priparolatan, aŭ disaŭdigi ĝin tute aŭ parte dum Esperantlingvaj elsendoj. N.Z.B.C. plezure sendos pluajn programojn per Esperanto se oni petos ilin. Redaktoroj de radio-programoj, personoj, kiuj havas rilaton kun radio-staciestroj aŭ influon sur la preparadon de la elsendoj estas petataj instigi respondulojn skribi al: Overseas Transcription Service, N.Z.B.C., P.O. Box 2396, Wellington C.1, Nov-Zelando, kaj peti la disponeblajn sonbendojn. Eĉ se N.Z.B.C. uzos nacian lingvon en korespondado, estas **nepre necese**, ke la petleteroj kaj aliaj alfluantaj korespondaĵoj estu redaktataj en Esperanto.

esperanto
sept./okt. 1965



Kongresa Libro



La ĉi-jara, 140-paĝa Kongresa Libro aldonis al la tradiciaj vtilaj informoj, detala programo kun mapoj, skizo pri la kongresa lando kaj ĝia movado, adresaro ktp., laŭfakan programindekson kaj artikolon "Kvindek Universala Kongresoj".

Japanujo Hieraŭ kaj Hodiaŭ. Turisma broŝuro eld. Tokai-E-Ligo, 1965. 35 p., 21 x 15 cm., kun multaj ilustraĵoj.

Prezentas per fotoj (unu kolora) kaj konciza teksto la aspektojn, historion, modernan evoluon, kulturon, artojn kaj sportojn de la jubilea kongreslando. Multaj preseraroj.

Veturo kun ĝojo per Norvega Stata Fervojo. Eld. Norges Statsbaner, Oslo. Senpaga faldfolio kun mapo de Norvegujo.

Ne tiel, sed tiel ĉi! Konsilaro pri stilo de F. Faulhaber. Eld. Dansk Esperanto Forlag, Aabyhøj, 1965. 63 p. 20 x 15 cm.

Memorskribo pri la Esperanto-monumento, Linz/D. Eld. Geroldinger, Linz, 1965. 24 p. 20 x 15 cm., multobl.

43a Germana Esperanto-Kongreso (Kongresa libro). 20 p. 21 x 20 cm. Il.

La volvotigo de amikeco, de Ŝoiĉi Hori. Eld. Gunma-Esperanto-Societo, Japanujo, 1965. 89 p. 21 x 15 cm., il. Kolekto de popularaj artikoloj pri biologiaj temoj.

Vivu Leninismo. Dua eldono, Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1963. 120 p. 18 x 13 cm. 1,— gld. (4 st.)*

El Popola Ĉinio, 1950-1965. Jubilea notlibro, eld. Ĉina E-Ligo, Pekino, 1965. 224 p. 15 x 10 cm., plasta kovrilo. Por abonantoj.

Japanaj malnovaj rakontoj. Kolektis Yana-gita kunio. Trad. kolekto. Eld. Amo-Akademio, Japanujo, 1965. 127 p. 19 x 13 cm., koloril.

Program-kajero. Nordlanda E-Kongreso, Oslo, 1965. 12 p. 21 x 15 cm.

Vizitu la fervojmuzeon, Hamar, Norvegujo. Senpaga faldfolio.

Unua kanzonaro. Kompilis D. Selso Eld. la aŭtoro, Buenos Aires 1965. 48 p. 21 x 16 cm., multobl. Popularaj kanzonoj argentinaj.

Priručnik za konverzaciju. Eld. Jugoslaviaj Fervojoj, Beograd, 1965. 38 p. 20 x 13 cm. Fervoja frazlibreto serba - franca - germana - angla - itala - esperanta.

Palencia, tero de kampoj. Turisma faldfolio.

Kongreslibro. Eld. 26-a Hispana Kongreso de Esperanto, Palencia, 1965. 30 p. 21 x 15 cm., il.

Dua Bulteno. Eld. Eŭropa Esperanto-Konferenco, Vieno, 1965. 46 p. 21 x 15 cm., il.

Frydek Místek 700-jara. Eld. MěNV, Frydek Místek, Ĉeĥoslovakio, 1965. Senpaga turisma faldfolio.

Kongreslibro de la 21-a Internacia Junulara Kongreso, Ootu, Japanujo, 1965. 35 p., 26 x 18 cm., ofsetita, il.

Kioto, Japanujo. Eld. Turisma Oficejo, Kyoto Tower Bldg., Higashi-Shiokojicho, Shimogyo-ku, Kioto, Japanujo. Prospekto kolora.

Poŝkantaro de KLEG. Eld. Kansai Ligo de E-Grupoj. 3-a eld. reviz. 1965. 24 p. 15 x 11 cm.

Kaguya Hime, rakonto de aŭtoro nekonata. Tr. kaj eld. Jamagata-E-Klubo 1964. 9 p. 18 x 25 cm., multobl.

Hungarlando. Atendas vin la lando de la 51-a U.K. de Eo. Eld. Hungara E-Asocio. Dukolora senpaga faldfolio.

Memorlibro de Oomoto-Internacia Festivalo. Eld. Oomoto, Kameoka, 1965. 73 p. 21 x 14 cm., il.

Antaŭen. Broŝuro eld. Japana E-Ligo Studenta, ĉe Japana E-Instituto, Tokio, 1965. 32 p. 21 x 15 cm., il.

La sorto de homo, novelo de Miĥail Ŝoloĥov, Tr. A. Agosti kaj N. Danovskij. Eld. Komisiono pri Internaciaj Ligoj de Sovetaj E-istoj, Moskvo, 1965. 40 p. 21 x 14 cm. Multobl.

Sekretaj sonetoj de Peter Peneter. Foto-represo. 95 p. 14 x 10 cm.

Japanaj Esperantistoj. Redaktis Hukuta masao. Eld. Asakesyoboo, Tokio, 1965. 92 p. da teksto + 22 p. da bildoj. Ofsetita.

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1965

Stato je la 31-a de aŭgusto

Konkurso I

Lando	kvoto	poentoj	%
1. Finnlando	2365	2590	109,51
2. Svislando	1800	1840	102,22
3. Hispanujo	2804	2850	101,64
4. Danlando	2704	2702	99,93
5. Usono	3827	3790	99,03
6. Nederlando	5140	5071	98,66
7. Germanujo	6551	6365	97,16
8. Francujo	7009	6795	96,95
9. Britujo	6053	5753	95,04
10. Italujo	3932	3560	90,54
11. Brazilo	3411	3006	88,13
12. Norvegujo	1490	1290	86,58
13. Belgujo	1770	1450	81,92
14. Svedujo	6190	5045	81,50
15. Japanujo	3745	2235	59,68
16. Jugoslavio	3295	1795	54,48

Konkurso II

1. Aŭstrujo	1090	1260	115,60
2. Kanado	702	769	109,54
3. Aŭstralio	1288	1278	99,22
4. Nov-Zelando	1195	1141	95,48
5. Argentino	760	695	91,45
6. Islando	250	215	86,—
7. Israelo	405	340	83,95
8. Sudafriko	250	195	78,—
9. Madagaskaro	250	120	48,—
10. Portugalujo	380	120	31,58
11. Urugvajo	250	65	26,—

(Vidu la regularon en "Esperanto" 1965, p. 38)

ĈEFDELEGITO AŬSTRUJO

Nova adreso: S-ro F. W. Rentmeister, Kauer-gasse 1/I St. 2, Stg. 15, WIEN XV/101, Postleit-zahl 1150, Aŭstrujo. Poŝta ĉekkonto Oester-reichischer Esperantisten Verband, 183.874 Wien.

DELEGITOJ

Argentino

Catamarca FD (Bankaj aferoj): vakas.

Aŭstralio

Kalamunda D: vakas.

Belgujo

Leuven FD (Politiko: Eŭropa Federalismo):
F-ino M.-T. Henquinez, ceramikistino, 1171/5
Sint Maartensdal.

FD (Turismo): la FD (Politiko).

Britujo

Ashford (Kent) 28.450.

D: S-ro A. J. L. Hughes, eksoficiro armea,
Lahloo, Woolpack Hill, Brabourne Lees;
tel. Sellindge 2296.

Cowling ĉe Keighley (Yorks).

D: S-ino E. Edmondson, emeritulino, Lower
Stone Head Farm.

Bulgarujo

Loznica FD (SOS-aŭto-servo): la D.

Sliven FD (Abelkulturo): S-ro Ivan I. Ĉernaev,
advokato, strato "Sofia" 1.

FD (Juro): la FD (Abelkulturo).

Ĉeĥoslovakio

Gottwaldov D: S-ro Otakar Matulík, teknik-
oficisto, Fučíkova XIII/3985; tel. (hejme)
39373; (laboro) 3151/2323.

FD (Kemio): la D.

Ostrava FD (Edukado): la JD.

Šumperk (Morava) 27.000.

D: S-ro Jos. V. Otta, fak-instruisto, Neru-
dova 32; tel. Esperanto-4373.

FD (Kuirarto): la D.

Francujo

Avignon D & FD: vakas.

Gronlando

Godthåb D: vakas.

Hispanujo

Guadix D: vakas.

Sevilla VD: S-ro F. González del Pino, instru-
isto, Strato Cristo del Buen Viaje 4; tel.
25-34-85.

FD (Edukado): la VD.

Italujo

Bologna D & FD (Abelkulturo): vakas.

San Fermo Vidu Como: FD (Turismo).

Jugoslavio

Zagreb JD: S-ro Branko Miškić, studento,
Vrhovčev vijećak 23, Zagreb 3.

Kanado

Quebec FD (Asekuro): vakas.

Monako

Monte Carlo FD (Turismo): S-ino M. Paris-
de Beauvais, Palais Miramare, 39 bis Bd.
des Moulins; tel. 30.68.85.

Nederlando

Heelsum (Gelderland): vidu Renkum.

Renkum (Gelderland): S-ro F. H. Kat, oficisto,
Hackettweg 33.

Tjerkwerd D & FD (Frisa lingvo): vakas.

Nov-Zelando

Wellington FD (Filatelo): vakas.

Sovetunio

Leningrad VD: S-ro Oskar Gardi, ĵurnalisto,
str. Ŝkolnaja 2, kv. 18; Leningrad-P-183;
tel. 33-74-56.

Svedujo

Kävlinge (Skåne) 3.500.

FD (Industrio: nutraĵa: buĉado): S-ro Tore
G. M. Fors, ekspedeja helpisto, Västra
Långgatan 3 D.

Storvik D & FD (Laktejoj): vakas.

Vargön 4.000.

FD (Magio): S-ro S. W. Ahlm, feraloja ven-
destro, Sandbergs väg 14; tel. (0521) 21481.

Svislando

Renens FD (Stenografio "Unesteno"): la D.

Usono

Boulder (Colorado) 45.000.

D: S-ro Charles F. Miller, laborestro, 3000
18th Street, Boulder, Colorado 80302; tel.
442-5448.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1965

356 Leitão, f-ino Carolina Maia, 357 Lima,
s-ro Alvaro H., Brazilo; 358 Lassen, s-ro Aug.,
Danlando; 359 Donovan, s-ro Walter J., Nov-
Zelando.

POR VASTIGO DE LA AGADO (JARO DE INTERNACIA KUNLABORO, JARO DE LA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO)

Schlüter, d-ro Klaus, Germanujo: 10,— gld.
Cate, s-ro H. J. ten, Nederlando: 5,— gld.

DONACO POR INTERNACIA ARTA TEATRO

Rozmarynowski, s-ro H., Usono: 18,— gld.

PATRONAJ MEMBROJ DE TEJO 1965

(Vidu "Esperanto", majo, p. 94)

A. (16,— gld.): 3. Mawson, s-ro F., Britujo; 4.
Ploussu, s-ro A.; 5. Vincent, s-ino J., Francujo;
6. Becker, s-ro G.; 7. Hölscher, s-ro E.; 8. Wes-
sel s-ino L., Germanujo; 9. Parson, f-ino E. L.;
10. Worcester, s-ino D.M., Britujo; 11. Lavergne,
s-ro M., Francujo; 12. Maschke, s-ro E.; 13.
Peine, s-ro O., Germanujo; 14. Hugiimoto, s-ro
T.; 15. Kitabatake s-ro T.; 16. Saito, s-ro E.;
17. Umeda, s-ro Y., Japanujo; 18. Olsson, s-ro
O., Svedujo; 19. Helmuth, s-ro F.E.; 20. Jungton,
f-ino E.M., Usono.

B. (5,— gld.): 1. Dean, s-ro E.F.; 2. Watford
Esp. Soc., Britujo; 3. Lanka, f-ino H., Germa-
nujo.

FONDAJO JUNULARA GAZETO (Gld.)

Mawson s-ro F., Britujo: 4,—; Lavergne,
s-ro M.: 4,—; Stuit, s-ro S., Francujo: 4,—;
Jäger, s-ro D.: 4,50; Künzel, d-ro H.: 9,—; Lan-
ka, f-ino H.: 8,55, Germanujo; Diversaj kon-
gresanoj en Tokio: 18,20; Liebermann, d-ro
E.J.: 28,—; Wesson, s-ro A.S.: 4,—; ELNA:
540,—, Usono.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro
ilia granda helpo.

M. H. Vermaas,
Direktorino C.O.

oficiala informilo

n-ro 383, 15 aŭg. 1965

esperanto
sept./okt. 1965

H.C. ANDERSEN



LA NOVAJ VESTOJ DE LA IMPERESTRO
KAJ DI ALIAJ FABELOJ

numraj kaj sagaj fabeloj por
plenkreskuloj. Luksa libro en
granda formato kun multaj ko-
loraj ilustraĵoj.

Prezo nur 30 steloj.

Eldonejo Koko - Kolby Kaas



Danlando

Petu la senpagan Koko-revuon.

ANONCETOJ

Pri plenumo de promesoj en anoncetoj respondecas sole nur la anoncintoj.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso: K.S.M., 12, Rue des Jacobins, Clermont-Fd. (PdD) Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

Kontrolkomisiono pri lernolibroj celas apogi la verkadon de bonaj lernolibroj. La komisiono trastudas la manuskriptojn kaj donas eventualajn konsilojn kaj rekomendojn. Adreso ĉe S-ro E. Malmgren, Heleneborgsgatan 6, Stockholm, Svedlando.

Se la vivo estas hazardo, moralo ne havas specialan sencon. Se la vivo funkcias laŭ certa sistemo, moralo havas gravegan signifon. Petu senpagan ilustritan faldprospekton ĉe Martinus-Instituto, Mariendalsvej 94-96, Kopenhago F., Danlando.

Bonvolu sendi al mi unu usonan dolaron kaj rekompence vi ricevos serion da italaj poŝtmarkoj. Anonco ĉiam validas. S-ro Luigi Toma, via dei Giudicati, 8 — Cagliari, Italujo.

25-jara floristino deziras korespondi kun la tuta mondo. Nepre respondos al ĉiu: Fraŭlino Elke Jessen, 226 Niebüll, Rathausstr. 12, Germana Federacia Respubliko.

Universalajn Kongres-glumarkojn kolektas kaj interŝanĝas F-ino Jeanette Sidorak, UEA-del., Kamienica 167, Bielsko-Biala, woj. Katowice, Pollando. Por kompletigi tutserion mankas el 1-a, 12-a, 13-a, 15-a ĝis 19-a, 27-a ĝis 29-a, 35-a ĝis 38-a, 40-a. Ŝanĝoj arangeblaj. Antaŭan dankon.

23-jara librotenisto, forlasinte pro financaj kaŭzoj universitatan studon de lingvoj Angla, Franca kaj Hispana, serĉas eksterlande laboron por 2 jaroj kiel instruisto. Ermanno Mello, via S. Maria 15, Bienno (Brescia) Italujo.

Geonkloj Esperantistaj estas plenkreskuloj kiuj korespondas en Esperanto kun infanoj. Detalojn: Sullivan, 3 Berwick Avenue, Urmston, Manchester, Britujo.

Nekatolikoj povas senpage ricevi la dumonatan revuon "Vojo Vero Vivo" kun informoj pri la katolika religio. Skribu klare viajn nomon kaj adreson al la Sekretariejo de la "Internacia Katolika Informejo", Gasthuisring 54, Tilburg, Nederlando.

Lokaj Esperanto-Grupoj festu je la 24-a de oktobro (aŭ je proksima dato) la Tagon de Unuiĝintaj Nacioj. Kiel bazo por prelegoj taŭgas ekzemple la teksto de prof. Lapenna en "Esperanto", aŭgusto, p. 142-5. Nepre sendu salut-leteron aŭ telegramon al la Sekretariato de U.N., Nov-Jorko.

La Dua Internacia Konferenco de Lernejoj, en kiuj Esperanto estas Instruata, okazos en bele aranĝita studenta hejmo en Graz, Aŭstrujo, de sabato la 23-a ĝis ĵaŭdo la 28-a de julio, 1966: tuj antaŭ la Universala Kongreso en Budapeŝto. Interesa, ampleksa programo. Detaloj sekvas.

CASA DOS BORDADOS

Oliveira, Esteves & Machado
Rua Fernandes Tomás, 692
PORTO (Portugalujo) - Telefono: 30058

Eksportistoj de tipaj portugalaj brodaĵoj de ĉiuj specoj.

Malaltaj prezoj — Fidinda honesteco
KORESPONDAS EN ESPERANTO



UZU LA JIK-GLUMARKOJN

Prezo: 0,40 gld.
(1rpk.) por unu
folio (10 markoj)

KAJ
VARBU
SUBSKRIBOJN !

ISLANDAJ PRAVOĈOJ

Baldur Ragnarsson donas al ni per sia eminenta traduko kaj per siaj ampleksaj klarigaj informoj novan enrigardon en la pranorda literaturo.

★

Prezo: broŝ. gld. 4,25, bind. gld. 6,75.

★


Mendu ĉe UEA aŭ via kutima libroservo

★

ELDONA SOCIETO ESPERANTO

NOVA ELDONO!

LA SESLINGVA FALDFOLIO (informfolio pri Esperanto)



ANGLA
FRANCA
GERMANA
HISPANA
RUSA
JAPANA

POR INTERNACIAJ NEESPERANTISTAJ KONGRESOJ

Alloga laŭ aspekto - Trafa laŭ enhavo
100 ekz. 6,— gld.

MENDU ĈE UEA
NIEUWE BINNENWEG 176 — ROTTERDAM

REVIVU LA RESTADON EN JAPANUJO per tiu ĉi bela volumo!

400 nomoj aŭ terminoj, tola bindaĵo kun kartona skatolo, riĉa ilustro. Prezo: 18 gld (72 st). Sola vendraĵto ekster Japanujo: U.E.A.



ENCIKLOPEDIETO JAPANA


Eldono de KOSMO Traduko de T. Nakamura
Okakura kakuzo

LA LIBRO DE TEO

Studolibro pri orientaj ideoj kaj idealoj

142 p.
luksa
prezento

\$ 2,50
9,— gld.
36 st.



"Kiam venis Enciklopedieto Japana, mi estis konvinkita, ke tiu libro estas apenaŭ super-
ebla. Sed jen La Libro de Teo ĝin superatutis!"

Juan Régulo-Pérez

Sola vendraĵto ekster Japanujo: UEA

LEGU



de UEA - jarabono (4 n-roj) 15,- gld.

Ekde 1965 aperas en granda formato. Abonu nun!

Okaze de la 150-a datreveno de la naskiĝo de Mihail Lermontov, la granda majstro de la rusa prozo, UEA eldonis ĉi tiujn elstarajn rakontojn en la traduko de D. Staritsky.

Kun bibliografio
de Lermontovaj
verkoj
en Esperanto

Moderna plasta
kovrilo

Prezo: 5,- gld.
(20 steloj)



Per plumo samtempe ekscita, kortuŝa, ironia kaj senspirege poezia, la aŭtoro vojaĝigas nin kun juna rusa oficiro, laca pri la vivo kaj kroĉiganta al la iluzia feliĉo de fortaj sensaĵoj.

Serio ORIENTO-OKCIDENTO n-ro 4

KALEVALA

la granda nacia eposo de la finnoj
verse tradukis J. E. Leppäkoski



368 paĝoj kun postprezento, lingvaj kaj ilustritaj etnografiaj klarigoj. Pli ol 100 vinjetoj kaj 1000 ornamaj komencliteroj de la fama finna artisto Axel Gallen-Kallela. Formato de "Naŭzo", "Malsata ŝtono" kaj "Rakontoj de Oogai".

Prezoj:

kun leda dorso 35,— gld (140 st)

tuttole bind. 25,— gld (100 st)

Sola vendrajto ekster Skandinavio: UEA

NUN ACETEBLA

kompleta kolekto de la revuo

MONDA KULTURO

de 1962 ĝis 1964, kune bindita en unu bele vestita volumo, kun ora surpriso kaj detala indekso laŭ temoj kaj aŭtoroj. Daŭre valora!

Nur 19,— gld.

76,— steloj

GRAVA ATENTIGO

pri la 51-a Universala Kongreso

Oni bonvolu bone noti, ke la ĝustaj datoj de la 51-a U.K. en Budapeŝto estas jenaj:

30 julio — 6 aŭgusto 1966

Aliĝiloj kaj Unua Bulteno kun la ĝustaj datoj estos baldaŭ dissenditaj.